Przemysław Paweł Grzybowski

# Renkontoj kun Diferenculoj

## Rakontoj por interkultura edukado



2a bita eldono

# Enhavtabelo

Kiel utiligi tiun ĉi libreton? - metodikaj rimarkoj al gepatroj kaj geinstruistoj 3

## EN LA MONDO DE PLENKRESKULOJ

**Unua** renkonto - Konatiĝu kun Kamila 6
**Dua** renkonto - Sinjoro Johano 9
**Tria** renkonto - Onklinjo Marta 12
**Kvara** renkonto - Davideto 15
**Kvina** renkonto - Avinjo Maria 18
**Sesa** renkonto - Fatima 21
**Sepa** renkonto - Sinjoro Pawlak kaj Pepulino 24
**Oka** renkonto - Sinjoro Karleto 27
**Naŭa** renkonto - Sinjorinoj Olga kaj Teresa 30

## EN LA MONDO DE INFANOJ KAJ GEJUNULOJ

**Deka** renkonto - Rikardo 33
**Dek unua** renkonto - Daria 36
**Dek dua** renkonto - Marko kaj Gabriela 39
**Dek tria** renkonto - Emilia 42
**Dek kvara** renkonto - Roberto 45
**Dek kvina** renkonto - Henriko, Laŭra kaj bandoj 48
**Dek sesa** renkonto - Familio de Onklino Herta 51
**Dek sepa** renkonto - Kim, Alex kaj Elina 54
**Postparolo** 57
Pri la verkinto 59
Pri la libro kaj la ilustrintino 60



**Reviziintoj:** Daniel Moirand, Katalin Kováts kaj Leandro T. Abrahão

**Enpaĝigo**: Leandro T. Abrahão

**Recenzintoj:** Prof. **Alina Szczurek-Boruta** el la Silezia Universitato en Cieszyn — Fako de Etnologio kaj Sciencoj pri Edukado — kaj Prof. **Bassam Aouil** el la Universitato Kazimierz Wielki en Bydgoszcz — Fako de Pedagogio kaj Psikologio.

# KIEL UTILIGI TIUN ĈI LIBRETON?

## Metodikaj rimarkoj al gepatroj kaj instruistoj

La tekstoj, kiujn enhavas la libreto estas destinitaj al **infanoj en la aĝo de 6 ĝis 10 jaroj**. Ili povus servi al familioj por legado en hejma etoso, aŭ al instruistoj kiel didaktika materialo por lecionoj en baza lernejo kaj dum Esperanto-kursoj.

La rakontoj prezentas pozitivan, idealigitan, do tipe fabelan bildon de la realo, priskribatan de Kamila – loĝanta en Pollando knabineto, kiu akompanate de proksimuloj (ŝiaj gepatroj kaj avo) konatiĝas kun diversaj personoj kaj en dialogo kun ili malkovras la mondon.

La Diferenculoj renkontataj de Kamila estas personoj, kiuj pro diversaj kialoj distingiĝas en la socio. Oni ofte perceptas ilin kiel strangajn, malkutimajn, kaj pro tio oni ofte interesiĝas pri ili kaj klaĉas, kreante pri ili stereotipajn opiniojn. Tiuj opinioj ofte estas malveraj kaj maljustaj, sed malgraŭ tio oni ripetadas ilin en ĉiutagaj konversacioj, televidprogramoj, artikoloj en gazetoj, komentoj en Interreto ktp. Ĉiu infano pli aŭ malpli frue renkontos Diferenculojn kaj nature reagos per surpriziĝo aŭ serioza demandado pri la konstatitaj faktoj.

En sinsekvaj rakontoj Kamila (kaj kun ŝi ĉiuj legantoj de la libreto) ekkonas **handikapulojn, malsanulojn, maljunulojn, personojn de fremdaj nacioj, kulturoj, religioj, kiujn karakterizas diversaj vivstiloj kaj perspektivoj**. Ilia nuna situacio ofte estas kaŭzita de okazintaĵoj, kiuj influis ilian karakteron, opiniojn kaj agadon. Kamila konstatas, ke ne ĉiuj homoj estas samaj. Pro ilia malsameco oni ŝatas ilin aŭ ne, perceptas ilin kiel pozitivajn heroojn aŭ kiel malbonvenajn trudemulojn. Ekzisto de Diferenculoj elvokas do agrablan interesiĝon – aŭ kontraŭe: elvokas malcerton, maltrankvilon, eĉ timon.

Renkontante Diferenculojn Kamila ekhavas respondojn je demandoj rilataj al ili kaj iom post iom konatiĝas kun tiuj personoj. Ŝi esploras la kondiĉojn, kiuj kaŭzis iliajn diferencojn kaj pro tio kapablas pli bone kompreni ilin. Ŝi ĉiam konvinkiĝas, ke malsamaj aspekto, agado kaj vivstilo, eĉ se malbone konsiderataj de iuj homoj, estas tamen parto de homeco, kiun necesas alfronti ĉiutage.

La ĉefaj nocioj de edukado, sur kiuj apogas sin ĉiu rakonto, estas: **toleremo, respekto je diferenco, konvinko pri devo koni alian homon antaŭ ol ekhavi opinion pri li kaj komenci pritaksi lian agadon**. Pere de sinsekvaj priskriboj de renkontoj kun Diferenculoj kaj per akompananta ilin moralo la rakontoj instruas, ke eĉ se iu unuavide ŝajnas stranga, oni ne devas pro tio diskrimini, ekskludi lin el la rondo de konatoj, geamikoj aŭ parencoj. Oni devas bone koni la personon kaj eksciinte pri ties problemoj kaj bezonoj, necesas etendi al li helpan manon, apogi lin per akompano, konversacio kaj rideto. Ĝuste ja akompano, konversacio kaj rideto estas la valoroj, kiujn infano povas dividi kun aliaj homoj – precipe kun bezonuloj.

La temoj de la rakontoj, el kiuj konsistas tiu ĉi libreto, **povus interesi ankaŭ pli junajn infanojn**. Tamen la decido pri sufiĉa matureco de la infanoj kaj ilia preteco je pli profunda konatiĝo kun la problemoj pritraktataj en la rakontoj, dependas de iliaj gepatroj kaj geinstruistoj, kiuj observante la infanojn analizas ilian scivolon kaj ĉiutagan aliron al informoj el la realo de plenkreskuloj (ekz. eblon rigardi televidon sen kontrolo de plenaĝuloj; aŭskultadi konversaciojn de pli aĝaj personoj). Nur do la gepatroj kaj geinstruistoj estas kapablaj decidi, ĉu iu infano jam

---

1. La nocio „Diferenculoj" estas skribita grandlitere pro tio, ke en sociaj sciencoj ĝi funkcias kiel esplorkategorio. Simile oni skribas: Mi, Mem, Fremduloj ktp. En aliaj kazoj la komenca granda litero estas ankaŭ signo de respekto kaj la maniero indiki proprajn nomojn en la lingvaĵo uzata de infano – ekz.: Avo, Avinjo Maria, Sinjoro Karleto ktp. En la kazo de propraj nomoj, oni ankaŭ ne uzas „la".

konas necesajn esprimojn kaj temojn, interesiĝas kaj demandas pri ili, provas pli bone kompreni ilin ktp. Se jes, tiam oni povas komenci diskutadi kun la infanoj, apogante sin je elektitaj rakontoj.

En lernejo *Renkontoj kun Diferenculoj* povas servi kiel **didaktika helpilo dum realigado de programoj de edukado** interkultura, civita, historia aŭ regiona. Ĉiun el la rakontoj eblas adapti al cirkonstancoj de medio de la lernejo laŭ makroperspektivo (rilate al vilaĝo, urbo, regiono, lando), aŭ mikroperspektivo (rilate al gefamilianoj, geamikoj kaj konatoj de la gelernantoj).

Antaŭ ol disponigi la libreton al infano, ĝiaj gepatroj kaj geinstruistoj devus decidi, ĉu partigi ĝian enhavon kaj iom post iom prezenti sinsekvajn temojn en difinitaj periodoj. Kompreneble oni povas permesi legi ĝin komplete, kondiĉe tamen, ke ĉiun rakonton sekvos sufiĉa tempo por pripensi ĝian sencon kaj diskuti pri la priskribitaj personoj. Post komuna legado kun la infano necesus demandi al ĝi, kiel ĝi komprenas difinitan rakonton. En kazo de suspekto, ke la infano malbone aŭ supraĵe komprenis ion, necesus kompletigi la rakonton per klarigoj. Se oni neglektus la problemon, povus okazi, ke la infano traktus la priskribitajn Diferenculojn ne kiel ekzemplojn de vere ekzistantaj homoj, sed kiel iajn fantaziajn heroojn, kompareblajn kun mitologiaj kreaĵoj, aŭ artefaritajn estulojn el bildrakontoj.

**Diskutante kun la infano necesas atentigi ĝin pri la fakto, ke en ĝia medio vivas personoj tre similaj al tiuj ĉi priskribitaj en la libreto; ke pli aŭ malpli frue la infano renkontos tiajn personojn kaj verŝajne havos similajn konsiderojn kiel Kamila**. Tiamaniere oni preparos la infanon por kontakto kun diferenco – ankaŭ la propra. Tiel oni apogos la infanon en la kreado de sinteno de pozitiva interesiĝo pri la situacio de Diferenculoj en diversaj cirkonstancoj kaj pri serĉado kaj kreado de dialogo kun ili, kies efiko povus esti reciproka kompreno kaj respekto.

Diferenculoj vekas intereson, foje ekstremajn emociojn, antaŭjuĝojn aŭ malŝaton. Pri kelkaj el ili oni eĉ ne parolas en ĉeesto de infanoj, opiniante, ke la temo estas tabua kaj rezervita nur al plenkreskuloj. Tamen, kion fari se infano komencas demandi ĝuste pri la tabuaj aferoj, kio pruvas, ke ĝi rimarkis ilian ekziston kaj ekinteresiĝis pri ili? Kion fari se Diferenculo estas en la okuloj de la infano iu el ties proksimuloj? Povas esti, ke la infano mem estas perceptata kiel Diferenculo en propra medio, aŭ mem opinias sin Diferenculo.

Legado de ĉiu rakonto kaj sekvanta ĝin trankvila diskuto ebligos prezenti al infano gravajn kaj seriozajn respondojn je ĝiaj demandoj pri aferoj, kiuj eĉ al plenkreskuloj foje ŝajnas ĝenaj kaj problemigaj. Danke al la rakontoj kreiĝas okazoj je konversacioj, kiujn valoras uzi, antaŭ ol la infano ekscios pri la ĝenaj aferoj per aliaj fontoj – eble vulgaraj, primitivaj, ideologiaj ktp. (ekzemple de siaj pli aĝaj kolegoj aŭ sociaj deviuloj, al kiuj oni konscie ne permesus eduki infanojn).

La libreto povus helpi en tiu ĉi situacio. Ĝi estas bazita sur la ideo de interkultura edukado, tio estas de renkonto kun Diferenculo, kreo de dialogo kun li, konatiĝo kun lia mondo, persona sperto de malsameco kaj kompreno kial la aferoj estas ĝuste tiaj. Nur tiel malŝato kaj timo povas esti anstataŭitaj de interesiĝemo kaj amikeco. Nur paŝon post paŝo, danke al sistema konado kaj komprenado, oni povas **malkovri Diferenculon kiel homon kaj kiel homon lin ekami**.

Jen listo de problemoj kaj nocioj ligitaj kun la sinsekvaj rakontoj en *Renkontoj kun Diferenculoj*:

- **Unua renkonto – Konatiĝu kun Kamila**: diverseco de nomoj, malkutima agado, malsano, klaĉado;
- **Dua renkonto – Sinjoro Johano**: diversecoj de aĝo kaj sekso, maljuneco, psika malsano, malkutimaj aspekto kaj agado, soleco, milito, koncentrejo, morto, sufero pro rememoraĵoj;
- **Tria renkonto – Onklinjo Marta**: malkutimaj aspekto kaj agado, ekskludo, soleco, morto, psika malsano, deprimo, sufero pro rememoraĵoj;
- **Kvara renkonto – Davideto**: negativaj stereotipoj, ksenofobio, diskriminacio, antisemitismo, milito, morto, holokaŭsto, Internacia Komitato de Ruĝa Kruco kaj Ruĝa Krescento, Marŝo de La Vivantaj;
- **Kvina renkonto – Avinjo Maria**: maljuneco, malkutima agado, perdo de memorkapablo,

malsano, kontraŭvola lasado de urino, dentprotezo, morto, sufero pro rememoraĵoj;

- **Sesa renkonto – Fatima**: ksenofobio, diverseco de religioj, Islamo, terorismo, ekskludo, diskriminacio, negativaj stereotipoj, manipulado per publika opinio, klaĉado;
- **Sepa renkonto – Sinjoro Pawlak kaj Pepulino**: maljunulejo, maljuneco, handikapo, malkutima agado, malriĉeco, soleco, sufero pro rememoraĵoj, psika malsano, paralizo;
- **Oka renkonto – Sinjoro Karleto**: senhejmeco, dependiĝo, alkoholismo, hejma perforto, malkutimaj aspekto kaj agado, ekskludo, negativaj stereotipoj, neantaŭvidebleco de agado, soleco;
- **Naŭa renkonto – Sinjorinoj Olga kaj Teresa**: diverseco de seksoj kaj vivstiloj, samseksaj paroj, homofobio, negativaj stereotipoj, diskriminacio de virinoj, humiligo, subigo, kidnapo, civitaj organizoj, feminismo;
- **Deka renkonto – Rikardo**: malkutimaj aspekto kaj agado, dikeco, rufa hararo, okulvitroj, diskriminacio, ekskludo, malsano, soleco;
- **Dek unua renkonto – Daria**: malkutimaj aspekto kaj agado, ciganoj, malriĉeco, malsato, ŝtelo, negativaj stereotipoj, antaŭjuĝoj, diskriminacio, senhejmaj infanoj;
- **Dek dua renkonto – Marko kaj Gabriela**: vicfamilio, malsano, malsato, sango, HIV/AIDOSO, negativaj stereotipoj, antaŭjuĝoj, diskriminacio;
- **Dek tria renkonto – Emilia**: riĉeco, soleco, solaj gepatroj, divorco, manipulado, klaĉado;
- **Dek kvara renkonto – Roberto**: malkutimaj aspekto kaj agado, kancero, morto, negativaj stereotipoj;
- **Dek kvina renkonto – Henriko, Laŭra kaj bandoj**: gejunulaj subkulturoj, malkutimaj aspekto kaj agado, konflikto de generacioj, negativaj stereotipoj, perforto;
- **Dek sesa renkonto – Familio de Onklino Herta**: morto, milito, diversecoj de lingvo kaj religio, rememorado pri prauloj, negativaj stereotipoj kaj antaŭjuĝoj;

**Dek sepa renkonto – Kim, Alex kaj Elina**: rifuĝintoj, milito, natura katastrofo, malriĉeco, rasismo, diskriminacio, ekskludo, civitaj organizoj, handikapo, morto, sufero pro rememoraĵoj.

En Pollando, *Renkontoj kun Diferenculoj* akiris pozitivajn opiniojn de universitataj fakuloj pri psikologio kaj pedagogio. Ĝiaj tradukoj estas disponeblaj en la angla, franca kaj germana lingvoj (sed sen aludoj pri Esperanto). Jen retejo de la libro ĉe ĝia pola eldonisto Oficyna Wydawnicza Impuls: http://www.impulsoficyna.com.pl/katalog/spotkania-z-innymi,1311.html.

Mi esperas, ke tia formo de la libreto akiros vian afablan akcepton. Bonan legadon al ĉiuj!

*Przemysław Paweł Grzybowski*

Bydgoszcz, julio 2014

# UNUA RENKONTO
## Konatiĝu kun Kamila



**TEMOJ**

Diverseco de nomoj
Malkutima agado
Malsano
Klaĉado

Saluton! Mi estas Kamila.

Miaj Gepatroj kaj Avo nomas min Mila – sed nur kiam mi kondutas bone. Tamen, se mi malbone agas, aŭ tro multe plendadas, ili nomas min Kamila. Laŭ mi, multe tro serioze, ĉu ne? Kvankam onidire en la mondo ekzistas iu princino Kamila kaj eble estus agrable, se min mem oni iam nomus tiel. Mi ankoraŭ pripensos la aferon.

Mi plej ŝatas la kromnomon Kama. Panjo diras, ke same kiel Mila, ĝi estas karesa kaj mi povas uzi ilin ambaŭ ĉar ĉiuj personoj iel ajn scios, ke temas pri mi. Do, mi estas Kama por geamikoj, koleginoj en la lernejo kaj eĉ por mia Instruistino. Mia antaŭnomo estas do unika! Certe ankaŭ la via estas tia. Eĉ se estas kontraŭe, tio tute ne gravas kaj vi rajtas inventi antaŭnomojn, kiujn vi deziras, kaj se iam ni renkontiĝos, mi nomos vin kiel vi preferas. Mi promesas.

Malgraŭ la unika antaŭnomo mi estas verŝajne tute ordinara knabineto, la plej simpla en la tuta mondo. Mi ŝatas legi librojn kun bildoj, sketi, rigardi en televido programojn pri bestoj. Kiam mi estos pli aĝa, miaj Gepatroj aĉetos por mi hundon, aŭ katon... aŭ kobajon! Nuntempe mi ankoraŭ ne scias, pri kiu besteto mi zorgos, ĉar ĉiumomente interesas min io nova kaj estas malfacile decidi.

Mi lernas en elementa lernejo kaj plenuminte ĉiujn taskojn mi ludadas kun kunulinoj en la korto apud mia domo. Mi ŝatas tomatsupon kaj kukumojn en kremo. Mi ŝatas mian jakon kun koloraj strioj, kiun iam mem faris por mi Avinjo. Ŝi mortis, ĉar ŝi estis maljuna kaj laca. Pro tio kun la Gepatroj mi ofte vizitas Avon, kiu nun vivas sole kaj certe estas trista. La nomo de mia Avinjo estis Kamila kaj Panjo diras, ke mi havas la saman nomon ĝuste post ŝi. Strange, ĉar kiam mi naskiĝis, Avinjo ankoraŭ estis vivanta, do ĉu mi povus havi nomon post ŝi? Mi ne tre bone komprenas tion kaj iam petos klarigojn de miaj Gepatroj.

Mi ŝategas viziti Avon en lia vilaĝo! Kvankam mi ne ŝatas, kiam salutante li pikas mian vangon per sia pika barbo kaj brakumas foje tro forte – sed poste mi estas kun Avo tre feliĉa. Iam li laboris kiel ĵurnalisto kaj vojaĝadis tra la tuuuta mondo, paroladis kun muuultaj homoj, fotis ilin kaj poste ĉion priskribadis en kolora gazeto aŭ rakontadis en radio. Li povis fari tion, ĉar li estas esperantisto. Li parolas Esperanton – la internacian lingvon – kaj danke al tio havas ĉie multajn geamikojn. Bonege, ĉu ne?

Avo diras, ke la mondo estas grandega, mistera kaj grandioza. Estas mirinde kiam li prenas de ŝranko fotalbumojn kaj rakontas pri vidindaĵoj. Kompreneble la samajn aferojn eblas vidi en televido aŭ Interreto, sed mi preferas aŭskulti Avon, ĉar li multe ŝercas. Li diras, ke mi estas same babilema kiel li kaj pro tio li ankoraŭ pli amas min. Amuza estas mia Avo, ĉu ne?

Danke al niaj babiladoj mi jam scias, ke en la mondo ekzistas diversaj homoj. Unuj estas malgrandaj, kiel mia najbarino Agata, kies gepatroj ĉiumatene ŝin kondukas al infanĝardeno. Aliaj estas altaj, tre grandaj, kaj surhavas grandegajn ŝuojn – kiel mia Paĉjo. Kelkaj estas maljunaj, kiel Sinjoro Irek, kiu estas najbaro de Avo. Aliaj estas junaj, kiel la eta Emila el la teretaĝo, kiu en la pasinta semajno perdis sian unuan denton. Homoj aspektas diversmaniere. Unuj havas rondan vizaĝon – ekzemple Sinjoro Henriko, kiu estas nokta gardisto kaj dimanĉe ŝatas manĝi muuulte da pastaĵo. Aliaj estas maldikaj kaj havas aknojn sur la nazo – kiel Petro el la gimnazio, kiu strange parolas kaj tuj ruĝiĝas kiam apud li preterpasas junulino. Nu, multaj homoj vivas en malproksimaj landoj kaj tute ne komprenas nian lingvon!

Unujn ni ŝatas, aliajn ne. Mi ne scias kial. Foje, se mi ne konas iun knabon, mi supozas, ke verŝajne mi lin ne ŝatus, sed kiam ni interkonatiĝas, plej ofte okazas, ke li estas tute simpatia kaj eblas ludi kune.

Ekzemple iam mi ne ŝatis Sinjoron Petro, ĉar li havas grandan hundon kaj preterpasante la koridoron tre laŭte tusas – eĉ nokte. Foje tio vekis min kaj pro tio mi timas eĉ saluti lin. Krom tio, kelkaj pli aĝaj knaboj el nia korto diris, ke Sinjoro Petro certe estas krimulo, ĉar neniu normala persono promenigas sian hundon nokte kaj dum pluvas.

Iam dum mi promenadis kun miaj Gepatroj, Sinjoro Petro proksimiĝis al ni kaj montriĝis, ke li estas tute ordinara. Li eĉ permesis al mi karesi lian hundon! Paĉjo klarigis al mi poste, ke en sia junaĝo Sinjoro Petro laboris en fabriko kaj malsaniĝis je astmo. Tio estas malsano, pro kiu oni ofte tusadas, sed kiu tute ne estas infekta. Kuracisto konsilis al Sinjoro Petro promenigi hundon ĉiam, kiam li malbone fartas aŭ malfacile spiras. Nun mi ne plu timas lin kaj foje ni eĉ kune distras lian hundon en la korto.

Avo diras, ke estas tiel. Post kiam ni konatiĝas de pli proksime kun iu, ni ne plu timas, ne plu opinias lin stranga kaj komencas kompreni multajn aferojn. Post la konatiĝo ni eltrovas, ke la persono estas tre interesa kaj afabla, kvankam antaŭe ŝajnis esti fremda kaj malbona. Mi iom hontas, ke antaŭe mi opiniis Sinjoron Petro krimulo!

Nun mi deziras rakonti al vi kelkajn historiojn. Ili temas pri homoj, kiuj havas diversajn problemojn – nu, certe kelkaj el ili estas vere gravaj. Antaŭ iom da tempo, se mi renkontus iun el tiuj personoj, certe mi ankoraŭ pensus simile kiel komence pri Sinjoro Petro kaj timus eĉ paroli al kelkaj el ili. Tamen ili estas simple malkutimaj! Tute ne pro tio, ke ili havas unikajn nomojn, kiel la mia, sed ĉar en ilia vivo okazis malkutimaj aferoj. Ili estas diferencaj de la plimulto el ni kaj ŝajnas pro tio ankoraŭ pli interesaj – kvazaŭ veraj herooj de fabeloj.


Se vi legas la libreton sola kaj ne tuj komprenos ĉion el miaj rakontoj, petu helpon de viaj Gepatroj, de via Instruistino aŭ Instruisto, eĉ de via Avo (se vi havas lin), aŭ simple de iu fidinda.

Nu, mi do komencu rakonti detale. Antaŭ multaj, multaj jaroj... En la fino de la mondo... Ho ve, tio ja tute ne taŭgas! La historioj, kiujn mi rakontos ne estas ja fabeloj, sed povus esti okazintaj eĉ hieraŭ, eĉ en via ĉirkaŭaĵo! Do ili komenciĝos tute ordinare...



# DUA RENKONTO

## Sinjoro Johano



### TEMOJ

Diversecoj de aĝo kaj sekso, maljuneco, psika malsano, malkutimaj aspekto kaj agado, soleco, milito, koncentrejo, morto, sufero pro rememoraĵoj

Mikaelo loĝas en la sama vilaĝo kiel Avo. Li estas pli aĝa ol mi kaj pro tio li estas terure memfida. Ni ne havas komunajn temojn por babili, ĉar lin interesas nur aŭtoj kaj komputilaj ludoj. Tamen, foje, kiam miaj Gepatroj kaj Avo zorgas pri propraj aferoj, mi ludas eĉ kun Mikaelo, ĉar tie ĉi mi havas neniun amikinon. Foje eĉ teda knabo povas esti utila.

Mikaelo havas praavon, kiu estas probable la plej stranga homo en la mondo! Komence mi tute ne sciis, ke li estas praavo de Mikaelo, ĉar ĉiuj kutime nomas lin Sinjoro Johano. Liaj familianoj diradas tiel, kaj la genajbaroj, kaj la leterportisto... simple ĉiuj. Mikaelo opinias, ke ekde kiam li memoras, ĉiam estis tiel.

Sinjoro Johano parolas al neniu. Li nur rigardadas. Tamen tre strange li rigardas, kvazaŭ li ne vidus. Li verŝajne neniam ridetas, sed nur peze spiradas. Kvankam ekstere estas varma vetero, li ĉiam surhavas lanan ĉapeton kaj dikan bluzon. Strange, ĉu ne? Iun tagon mi observis lin tra truo de arbusto kaj mi povus ĵuri, ke li parolis al si mem aŭ al iu nevidebla! Mi tute ne scias, kiel ĉio ĉi okazas. Eble iuj parolas kun personoj, kiujn vidas nur ili? Eble kun iaj fantomoj? Ho ve, mi terure timas fantomojn! Sinjoro Johano verŝajne tute ne.

Kiam la vetero estas bela, li plej ofte sidadas sur benko, antaŭ sia hejmo kaj manĝas sekan panon. Mi scias, ke tio estas bona por sano. Panjo diras, ke danke al tio oni havas fortikajn dentojn kaj belan haŭton. Sed Sinjoro Johano ne plu havas dentojn, ĉar li estas tre maljuna – eĉ pli maljuna ol Avo. Por lia haŭto la pano ankaŭ ne tre bone efikas, ĉar li ĉiam havas ruĝajn nazon, vangojn kaj orelojn. Kiam mi diris al Panjo, ke Sinjoro Johano havas vizaĝon kvazaŭ senbarba Sankta Nikolao, ŝi iom koleris kaj diris, ke kelkaj personoj tiel aspektas kaj oni ne rajtas ridi pri ili. Sed tiam mi ja tute ne ridis!

Foje Sinjoro Johano subite ekstaras de sur la benko kaj komencas kuri, kvazaŭ fuĝante de iu. Li kuras, kuras kaj kuras... kaj finfine kaŝas sin malantaŭ arbustoj apud iu vilaĝa butiko aŭ sub benko de bushaltejo. Tiam la Gepatroj de Mikaelo fariĝas tre maltrankvilaj. Ili serĉas Sinjoron Johanon en la ĉirkaŭaĵo kaj trovinte lin, ili devas longe konvinkadi lin, ke jam estas sekure kaj ke li povas reiri hejmen.

En tiuj okazoj Mikaelo fariĝas nervoza kaj eĉ ne iras eksteren por ludi, ĉar liaj kolegoj mokas lin dirante, ke en lia familio estas frenezulo, do se Sinjoro Johano estas freneza, certe ankaŭ Mikaelo iam freneziĝos. Kompatinda Mikaelo!

Mi demandis Avon, kio okazas al Sinjoro Johano kaj ĉu vere Mikaelo freneziĝos? Avo unue iom tiretis sian barbon (li ĉiam faras tiel pripensante ion) kaj poste prenis de breto libron kun nigre-blankaj ilustraĵoj. Sur ili estis koridoroj kvazaŭ faritaj el pikdratoj, soldatoj kun pafiloj kaj multe da homoj en vestaĵoj similaj al piĵamoj kun strioj. Sur la fotoj estis eĉ tre malgrandaj infanoj, ege maldikaj kaj terurigitaj de timo. Sola mi ne povus rigardi tiujn terurajn bildojn. Tamen Avo trankvile klarigis ĉion al mi.


Li rakontis, ke kiam Sinjoro Johano estis tre juna, estis granda milito. Iun tagon venis malbonaj homoj, forprenis lin kaj lian tutan familion el la hejmo kaj retenis ilin en koncentrejo. Tio estas speciala malliberejo por diversaĝaj personoj, kiujn oni enfermis tie, kvankam ili faris nenion malbonan. La soldatoj devigis ilin laboradi kaj longe stari malgraŭ frosto. Oni ankaŭ tre malmulte nutradis ilin. Pro ĉio ĉi multaj el la malliberuloj mortis aŭ grave malsaniĝis.

Ĝuste en la koncentrejo frostvundiĝis la nazo kaj vangoj de Sinjoro Johano – kaj pro tio li havas hodiaŭ tiel malbelan vizaĝon kaj ŝatas dikajn vestaĵojn. Ĉar dum kelkaj jaroj li malsatadis, reveninte hejmen li estis tre feliĉa, ke ĉiun tagon li povas ion manĝi. Tamen ekde tiam li daŭre timas, ke la manĝaĵo ne sufiĉos. Pro tio li ĉiam manĝadas ŝparitan sekan panon.

En la koncentrejo pereis ĉiuj proksimuloj de Sinjoro Johano kaj pluraj liaj konatoj. Lian Panjon mortpafis gardisto. Sinjoro Johano vidis tion kaj neniam forgesis. Iun tagon li diris al Avo, ke li revas konversacii kun sia Panjo. Foje eĉ ŝajnas al li, ke ŝi revenis kaj staras apude. Tiam li rakontas al ŝi siajn aferojn. En pli malbonaj tagoj, kiam la rememoraĵoj estas tro fortaj kaj en sonĝoj aperas la malbonaj homoj, tiam Sinjoro Johano kvazaŭ denove fariĝas infano kaj provas fuĝi de la bildoj el la pasinteco. Li do kaŝas sin same kiel li faris en la koncentrejo, kiam li timis, ke iu faros al li ion malbonan.


Nun mi jam scias, ke oni ne rajtas diri, ke li estas frenezulo. Tio estus tre malĝentila. Avo diras, ke Sinjoro Johano tre multe suferadis en sia vivo kaj tial estas al li malfacile liberiĝi de rememoraĵoj. Li do agas iom strange, sed ĉiam li estas bona, sentema homo, kies historio povus multon instrui al ni ĉiuj.

Eĉ se iu agadas malsame de la plimulto en la ĉirkaŭaĵo, tio ne signifas, ke li estas malbona aŭ evitinda. Personoj, kiuj havis multajn malfacilajn travivaĵojn, bezonas speciale multe da zorgo kaj ridetoj. Eĉ se ili ne emas babiladi, certe ili estos feliĉaj kiam iu almenaŭ akompanos ilin. Danke al tio, ili sentos sin amataj kaj sekuraj.



## TRIA RENKONTO

# Onklinjo Marta



**TEMOJ**

Malkutimaj aspekto kaj agado, ekskludo, soleco, morto, psika malsano, deprimo, sufero pro rememoraĵoj

Morgaŭ estos mia naskiĝtago! Mi senpacience atendas ĝin, ĉar miaj Gepatroj, kiel kutime, preparos etan feston. Estos torto kun kandeloj, kruĉo da limonado, kantado kaj gastoj. El tiuj ĉi aferoj mi plej ŝatas la vizitantojn, ĉar malofte eblas kunigi en unu loko ĉiujn, kiujn mi amas. Krome, ĉiuj alvenos bele vestitaj, parfumitaj, kunportos florojn kaj eble iun donacon. Estos tre agrable!

Kun la Gepatroj mi foje vizitas diversajn personojn: Avinjon Maria – kiu loĝas ĉe la alia flako de la rivero –, Avon, kelkajn Geonklojn... Ĉe ili mi povas ludi kun gekuzoj, manĝi glaciaĵon, foliumi belajn librojn kaj rigardi fotojn. Ofte ni amuziĝas aparte, dum la plenkreskuloj restadas en apuda ĉambro kaj konversacias pri ege tedaj aferoj: politiko, televidaj filmserioj kaj mono.

Mia familio estas mirinda. Mi ŝatas ĉiujn familianojn. Kompreneble kelkajn pli, aliajn malpli. Mi konstatis, ke la plenkreskuloj ne tre ŝatas Onklinjon Marta, ĉar ŝi estas stranga. Ŝi ĉiam estas nigre vestita. Tre malofte ŝi vizitas iun ajn, sed se iu venas, ŝi preskaŭ neniam alparolas la gaston. Ŝi sidas en angulo aŭ sole rigardas tra fenestro. Krome, foje ŝi eĉ ne restas ĝis la fino de la renkonto kaj foriras adiaŭante neniun. Mi rimarkis, ke la plenkreskuloj poste parolas pri ŝi flustre kaj kelkaj eĉ ridas. Ĉio ĉi estas tre tristige, ĉar ni ja estas familio!

Onklinjo Marta estas la pli aĝa fratino de mia Patro. Li diras, ke ŝi havis tre malfacilan vivon kaj pro tio ŝi nun estas kvazaŭ floro. Kiam brilas la suno kaj venas belaj tagoj, Onklinjo Marta kvazaŭ ekburĝonas, komencas rideti kaj paroli, promenas ekster la hejmo, zorgas pri rozoj en la ĝardeno, aŭ helpadas al najbarino en ties legombutiko.

Tamen pli ofte estas tute kontraŭe. Onklinjo Marta fermiĝas, eĉ iom ŝrumpas kaj kaŝas sin de antaŭ la tuta mondo – same kiel floroj, kiuj antaŭ fulmotondro, aŭ vespere, fermas siajn petalojn. Ŝi tiam ŝutras ĉiujn fenestrojn, ne respondas je telefonalvokoj, kaj dum pluraj tagoj restadas hejme. Paĉjo diras, ke verŝajne en tiuj okazoj ŝi preferas estadi kun propraj pensoj kaj rememoraĵoj, ĉar probable la vivo lacigis ŝin, do ŝi bezonas iom da tempo por denove retrovi sian lokon inter la homoj.

Mi ne komprenas kiel tio okazas. Onklinjo Marta ja ne perdiĝis, sed ĉiam estas tie ĉi! Tamen rigardante ŝin oni havas la impreson, ke vere io tia okazis. Ŝi aspektas kvazaŭ ŝi ne plu vivus aŭ ne plu dezirus vivi. Ege malfacila afero. Paĉjo diras, ke tio nomiĝas deprimo. Tio estas malsano, kiun oni devas kuracadi dum pluraj jaroj, sed ofte medikamentoj ne tuj helpas, do malsanuloj fariĝas kvazaŭ floroj. Oni ne povas esti infektita de deprimo. Homoj malsaniĝas je tio plej ofte, kiam en ilia vivo okazis io terura aŭ ili pli frue suferis pro aliaj gravaj malsanoj. Ili ne plu kapablas zorgi pri siaj devoj.

Onklinjo Marta iam havis edzon kaj du infanojn. Ili estis ordinara familio, en kiu ĉiu havis siajn aferojn kaj zorgojn, sed por ili plej gravaj estis la komunaj plezuroj. Iun tagon ili veturis per aŭto al marbordo. Preskaŭ antaŭ la celo de la vojaĝo ekpluvis kaj la vojo fariĝis tre glita. Subite el vojkurbiĝo venis granda kamiono kaj en la momento, kiam Onklinjo Marta volis devojiĝi por ne trafi ĝin, tiam ŝia aŭto glitis kaj okazis terura akcidento. Saviĝis nur la Onklinjo, sed ŝi estis grave vundita.

Reveninte el la hospitalo, dum longa tempo ŝi ne povis rememori kio okazis. Finfine ŝi komprenis, ke ĝuste sur la vojo ŝi perdis siajn proksimulojn. Ŝi komencis kulpigi sin pro la akcidento kaj diri, ke preferinde estus, se ŝi mem estus pereinta; ke tio estas maljustaĵo, ĉar la familianoj ne plu ekzistas kaj ŝi devas vivi kun la konsciencriproĉoj. Se kuracistoj ne preskribus al ŝi specialajn medikamentojn kaj ne konversaciadus kun ŝi tiel ofte, verŝajne Onklinjo Marta farus al si mem ion malbonan.

Ekde tiu momento ŝi ĉiam surmetas nigrajn vestojn. Kiam ŝi rigardas infanojn aŭ ridetantajn homojn, ŝi rememoras la propran familion kaj fariĝas tre trista. Estas tagoj, dum kiuj ŝi tute ne emas ellitiĝi, moviĝi, eĉ spiri. Ĉio maltrankviligas ŝin kaj ŝi ne deziras eĉ la plej malgrandan

ŝanĝon. Pro ĉio ŝi fariĝas kolera, ĉio ĝenas kaj suferigas ŝin. Tiam do ŝi fuĝas en proprajn rememoraĵojn kaj en pensoj ŝi vagadas tre malproksimen dezirante nur trankvilon.


Mi dezirus, ke Onklinjo Marta vizitu min okaze de mia naskiĝtago kaj ke almenaŭ tiam la suno brilu speciale por ŝi. Mi deziras, ke ŝi ne ploru dum ni ĉiuj ridos. Ankaŭ Paĉjo estus feliĉa.

Se iun tagon iu el la ĉirkaŭajo ĉesos paroli kun aliaj personoj kaj komencos agadi malsame, tio ne signifas, ke li estas malbona aŭ evitinda. Eble li suferas pro deprimo kaj serĉas novan vojon al homoj, kiujn en la fundo de sia koro li daŭre amas. Li bezonas tre multe da atento kaj zorgo por rekomenci ĝui la vivon.



## KVARA RENKONTO

# Davideto



### TEMOJ

Negativaj stereotipoj, ksenofobio, diskrimino, antisemitismo, milito, morto, holokaŭsto, Internacia Komitato de Ruĝa Kruco kaj Ruĝa Krescento, Marŝo de La Vivantaj

Iun tagon Panjo anoncis, ke tagmanĝos kun ni eksterlanda gasto. Lia nomo estas Davideto, kaj li loĝas en Israelo. Li venos al Pollando por partopreni en la Marŝo de La Vivantoj – renkontiĝo de personoj, kiuj deziras pacon en la mondo. Davideto ne plu estas knabo. Simple, Avo – kiu konas lin de sia infanaĝo – ĉiam nomis lin Davideto kaj ni kutimiĝis al tio. Komence la renkonto iom maltrankviligis min, ĉar Davideto estas judo.

Antaŭnelonge venis en nian lernejon studentoj, kiuj kunportis multajn paperaĵojn kun tabeloj. Nia Instruistino petis, ke ni respondu sincere al iliaj demandoj, ĉar ili preparas sciencan esploron, do se ni ŝercus, la studentoj ricevus malbonan noton. Ĉiu el ni iom timis la esploron, ĉar ni pensis, ke eble oni devos viziti kuraciston! Sed bonŝance la Instruistino klarigis, ke ĉio ĉi estas nur nome serioza kaj ke oni nur konversacios kun ni.

La studentoj demandis, kun persono de kiu nacieco ni preferus ferii aŭ loĝi en la sama ĉambro dum ekskurso. Kompreneble la plej multaj infanoj elektis usonanojn kaj anglojn, ĉar de ili eblas lerni la anglan lingvon kaj poste pli facile trovi laboron. Kiam la studentoj demandis, kun kiu ni ne dezirus loĝi en la sama ĉambro, la plimulto el ni fakte ne sciis, kion respondi. Kelkaj knaboj respondis, ke estus malbone loĝi kun eskimo (ĉar li certe preferus ĉion malvarma) aŭ judo.

Mi ne komprenis, ĉar neniam en la vivo mi renkontis judon. Foje mi aŭdas, ke ebriaj ŝatantoj de futbalo kriaĉas surstrate, ke iliaj kontraŭuloj estas judoj. Sur muro de bushaltejo iu skribis *„Barça Mastro – Real judo kaj malamiko*”[2] Mia Paĉjo diras, ke ŝatantoj de la futbalista klubo Barça volis tiel ofendi personojn el alia klubo; tial ili skribis tiun provokan tekston, kvankam la plimulto el ili certe konas neniun judon. Stulte, ĉu ne? Nu, kiam oni ne konas iun, oni ne povas diri, ke li estas malbona aŭ malamika!

Judoj estas samaj homoj kiel francoj, rusoj, germanoj aŭ brazilanoj, kaj ilia popolo havas tre interesan historion. Antaŭ multaj jarcentoj ili vivis en lando pri kiu parolas la Biblio – unu el la plej popularaj libroj en la mondo. Ili komercadis, bonege sciis skribi kaj lerni fremdajn lingvojn. Pro tio ili multe vojaĝis kaj restis en pluraj landoj. Ili loĝas tie ĝis nun kaj foje havas du naciecojn. Tio signifas, ke ekzemple ili estas samtempe judoj kaj poloj kaj foje parolas kelkajn lingvojn. Bonege, ĉu ne?

Malbonaj homoj enviis judojn pro multaj aferoj kaj ofte persekutadis ilin. Kelkaj eĉ volis pereigi ĉiujn judojn. En la lernejo mi eksciis, ke tio nomiĝas holokaŭsto. Avo rakontis al mi, ke dum granda milito, kiam miaj Panjo kaj Paĉjo ankoraŭ ne ekzistis, multaj judoj loĝis en lia vilaĝo. Iun tagon alvenis soldatoj kaj bruligis iliajn domojn. Multajn judojn ili mortigis aŭ forveturigis, oni ne scias kien. Kiam ĉio trankviliĝis, malfrue nokte iu heziteme frapetis sur la pordon de la domo de Avo. Estis Davideto, lia lerneja kolego. El ĉiuj judoj de la vilaĝo nur li saviĝis. Dum la soldatoj pafadis, li forkuris kaj kaŝis sin en la apuda arbaro.

Praavo kaj Praavino estis tiam ankoraŭ junaj. Ili akceptis la timigitan knabeton, lin nutris kaj kaŝis en garbejo. Matene ili alvokis ĉiujn familianojn kaj anoncis, ke Davideto loĝos kun ili. Tamen, ĉar la malbonaj homoj povus serĉi lin, tial li dormis en grenejo kaj tute ne rajtis iri eksteren – eventuale nur nokte kaj por eta momento. Neniu rajtis paroli pri li, ĉar se la malbonaj homoj ekscius, kie li estas, ili mortigus ne nur la judan knabeton, sed ankaŭ ĉiujn vilaĝanojn, kaj bruligus la restantajn domojn. Terure, ĉu ne?

Davideto vivis do en la garbejo ege mallaŭte. Praavinjo kaŝe portadis al li manĝaĵojn, kaj dum li estis malsana, ŝi liberigis hundon por ke ĝi boju ĉe la stratbarilo por malaŭdigi la tusojn de la knabeto. Kiam la milito finiĝis, pri Davideto ekzorgis sinjorino el la Komitato de la Ruĝa Kruco kaj Ruĝa Krescento (tio estas internacia organizo, kiu helpas al homoj en diversaj problemoj). Ŝi aranĝis lian forveturon al Israelo, kie loĝis lia onklo. Dum pluraj jaroj ne venis novaĵoj pri Davide-

---

2. Temas pri famaj, ofte konkurencaj futbalteamoj: la kataluna Futbol Club Barcelona (mallonge: Barça) kaj la hispana Real Madrid Club de Fútbol (mallonge: Real).

to. Avo ofte sonĝis, ke ili ludas kune en herbejo. Nur antaŭnelonge el Israelo venis letero, kaj kiam Avo eksciis, ke Davideto venos al Pollando, li tuj invitis lin al ni.


Davideto montriĝis ege simpatia. Li longe salutadis Avon kaj ambaŭ kortuŝite ploris kiam ili iris por rigardi la garbejon, en kiu Davideto pasigis tiom da tempo. Poste li rakontis al ni pri Israelo, montradis fotojn de sia familio kaj de porinfana hospitalo, en kiu li laboras. Lia nepino Sara estas en mia aĝo. Mi momente parolis kun ŝi per telefono kaj verŝajne ni pasigos kune iun somerferion. Mi tute ne komprenas, kial mi timu aŭ ne ŝatu ŝin!

Eĉ se pri iuj homoj oni diras, ke ili estas malbonaj, tio ne signifas, ke tio estas vero, kaj ke necesas eviti ilin. Foje la malbonaj opinioj estas senpripense ripetataj de longa tempo kaj ili neniel estas realaj. En ĉiu nacio ekzistas diversaj homoj kaj eblas pritaksi ilin nur kiam oni renkontas kaj bone konas ilin. Prefere oni ne ripetadu malcertajn rakontojn pri iu, ĉar oni povus vundi lin kaj mem ekhavi opinion de mensogulo.



## KVINA RENKONTO

# Avinjo Maria



### TEMOJ

Maljuneco, malkutima agado, perdo de memorkapablo, malsano, kontraŭvola lasado de urino, dentprotezo, morto, sufero pro rememoraĵoj.

Hieraŭ ni vizitis Avinjon Maria por bondeziri okaze de la tago de patrinoj. Avinjo Maria estas la patrino de mia Paĉjo, do ŝi estas samtempe patrino kaj avino. Tial oni povas bondeziri al ŝi okaze de ambaŭ festoj. Bonege, ĉu ne?

Avinjo Maria estas jam tre maljuna. Eĉ pli maljuna ol Avo. Pro tio do ŝi ne plu povas fari ĉion kiel antaŭe. Ŝi tre malrapide paŝas, manĝas, nur helpe de lupeo legas librojn kaj en butikoj tre longe cerbumas antaŭ ol aĉeti ion. Ŝi rigardas la saman fromaĝon kelkfoje, poste alian, kaj ankoraŭ unu... kaj finfine aĉetas la unuan, kiun ŝi rigardis. Ĉe kaso ŝi ĉiam paroligas la kasistinon kaj longe serĉadas monon. Se iu persono en la vico hastas, foje tiu diras al Avinjo malbelajn vortojn.

Paĉjo opinias, ke Avinjo Maria havas sian malgrandan mondon kaj vivas en ĝi kvazaŭ nenio alia ekzistus. Ne gravas, pri kio oni parolas, ŝi iel ajn rememoras ion el sia juneco kaj komencas rakonti. Foje tio estas tre amuza, ĉar ŝi rakontas plurfoje la samajn aferojn. Ni do ridas kun ŝi, ĉar ni bone scias, kiel finiĝos ĉiu rakonto. Avinjo malgraŭ ĉio ŝatas rakontadi al ni. Se ŝi komencas, estas malfacile haltigi la rakontadon.

Avinjo Maria bonege memoras nur kelkajn aferojn kaj aliajn rapide forgesas. Dum longa tempo ŝi kapablas rakonti rememoraĵojn el sia lernejo kaj tion, kion ŝi legis aŭ rigardis en televido antaŭ longa tempo. Ŝi forgesas tamen, kien antaŭ unu horo ŝi metis la okulvitrojn, aŭ kion ŝi manĝis hieraŭ tagmeze. Foje, kiam ni kune eliras por promeni aŭ butikumi, post kelkaj paŝoj Avinjo demandas nin, kien ni iras aŭ eĉ sentas sin perdita survoje.

Paĉjo tre timas, ke Avinjo Maria povus iam forgesi ion tre gravan – ekzemple fermi kranon aŭ malfunkciigi gaskuirilon. Pro tio, en la tuta loĝejo pendas koloraj paperetoj, kiuj rememorigas al ŝi pri fermo de pordoj, malŝalto de lampo, kontrolo de gaso kaj akvo. Paĉjo aĉetis por ŝi ankaŭ specialan horloĝon, kiu sone anoncas, ke necesas preni medikamentojn.

Kompreneble Avinjo Maria ne sukcesus mem zorgi pri la tuta apartamento. Ĉiutage, do, Paĉjo, Panjo aŭ iu onklino alvenas tien por helpi al ŝi ŝanĝi vestaĵojn, purigi, aĉeti ion kaj zorgi pri manĝaĵoj. Avinjo ĉiam estas tre kontenta kaj salutas ilin kvazaŭ ili ne estus vidintaj unu la alian jam de tre longa tempo.

Estas tagoj, dum kiuj Avinjo fartas tre malbone. Ŝi diras, ke ŝiaj ostoj strikas. Tiam ŝi apogas sin sur bastoneto, surmetas dikan jakon kaj lanan pantalonon, eĉ se ekstere estas varme. Avo klarigis al mi, ke maljunaj personoj kutime ŝatas la varmon. Ili ŝatas ankaŭ dolĉaĵojn – tre ŝatas! Avinjo Maria trinkas teon ĉiam kun multe da konfitaĵo aŭ mielo, kaj en la kuirejo ŝi ĉiam havas skatolon plenan je kuketoj.

Foje Avinjo Maria ne sukcesas atingi necesejon kaj pisas en la kalsoneton. Ŝi ĉiam bedaŭras kaj hontas pro tio, ĉar aperas malbona odoro kaj oni devas lavi ĉion. Antaŭ iom da tempo Panjo ekhavis ideon, ke necesas aĉeti por Avinjo vindaĵojn por plenkreskuloj. Oni povas surmeti ilin nokte aŭ tage kaj forĵeti ilin kiam ili malpuriĝis. Komence Avinjo Maria tute ne deziris surmeti ilin kaj estis tre kolera, sed nun ŝi jam alkutimiĝis – same kiel al siaj novaj dentoj.

Avinjo Maria havas artefaritan dentaron! Paĉjo diras, ke tio nomiĝas dentprotezo. Antaŭ ol dormi ŝi deprenas ĝin kaj lasas en glaso kun akvo. Vekiĝinte ŝi metas la dentprotezon en la buŝon kaj firmigas per speciala gluaĵo por ĝin ne perdi. Danke al tio ŝi povas mordi freŝan karoton aŭ manĝi sekigitan panon. Kiam ŝi havas bonan humoron, ŝi demetas la dentaron kaj ŝerce timigas min per ĝi. Ni tiam multe ridas!

Mi tre malŝatas, kiam Avinjo Maria diras, ke baldaŭ ŝi mortos kaj mi povos heredi ŝiajn librojn kaj memoraĵojn. Mi ja tute ne deziras havi ilin! Mi volas, ke Avinjo vivu kiel eble plej longe. Tamen ŝi diras, ke ŝi jam deziras morti, ĉar en ĉielo ŝi renkontos siajn parencojn kaj lernejajn geamikojn, kiuj mortis antaŭ multe da tempo. Ŝi tre sopiras pri ili. Ofte dum tuta tago ŝi rigardas albumojn kun malnovaj fotoj, ĝemadas kaj foje eĉ ploras. En ŝia hejmo estas amaso da malnovaj objektoj, kiujn ŝi tre ŝatas, ĉar ĉiu estas ligita kun rememoraĵoj.

Mi estas trista vidante, ke Avinjo Maria estas kaduka. Estas por mi malfacile imagi, ke ŝi baldaŭ povus morti. Tamen Avo diras, ke oni devas konsenti je tio, ĉar homoj estas kvazaŭ folioj sur arboj. Printempe ili naskiĝas kaj beliĝas, sed iun tagon alvenas aŭtuno kaj ili komencas maljuniĝi. Tiam ili sekiĝas, malfortiĝas, ŝrumpas kaj finfine forblovas ilin la vento. Ili restas en nia memoro, sur fotoj. Ni rememorados pri ili en lokoj, kiujn ni kune vizitis. Ni pensos pri ili rigardante objektojn, kiuj apartenis al ili.

Eĉ se iu maljuniĝas kaj ne plu povas fari multajn aferojn kiel antaŭe, li vivas nur kun rememoroj kaj ofte parolas pri morto, oni ne rajtas eviti tiajn personojn aŭ kritiki ilin – eĉ se ilia agado estus malagrabla por iu. Maljuneco kaj morto atendas nin ĉiujn kaj ne eblas tion ŝanĝi. Tial estas grave ĝoji pro ĉiu momento pasigita kun homoj, kiujn ni amas.



# SESA RENKONTO
## Fatima

**TEMOJ**

Ksenofobio, diverseco de religioj, Islamo, terorismo, ekskludo, diskrimino, negativaj stereotipoj, manipulado per publika opinio, klaĉado.



Lastatempe Avo havas amason da laboro. Vizitadas lin Fatima – studentino, kiu verkas magistrigan disertaĵon. Temas pri granda tasko. Se ŝi ĝuste plenumos ĝin, ŝi rajtos ricevi diplomon pri finitaj studoj. Fatima demandas Avon pri liaj vojaĝoj, pri homoj, kiujn li renkontis en malproksimaj landoj kaj pri iliaj kutimoj kaj arto. Ŝi ĉion notas kaj ordigas kolorajn fotojn por ilustri la notojn. Kiam mi estos pli aĝa, ankaŭ mi estos studentino kaj verkos magistrigan disertaĵon!

Fatima ĉiam surhavas tukon sur la kapo. Avo diras, ke ĝi estas signo de ŝia religio. Fatima estas islamanino kaj loĝas en vilaĝo, kiu nomiĝas Malgranda Tatarlando. Amuza nomo, ĉu ne? La familio de Fatima kaj aliaj loĝantoj de Tatarlando estas nomataj tataroj. Antaŭ multaj, multaj jaroj, iliaj prauloj venis tien ĉi el Azio. Ili vagadis dum tre longa tempo. Pro bona servo al reĝo ili ricevis donace de tiu la vilaĝon. Kvankam pasis kelkaj jarcentoj (unu jarcento estas cent jaroj), ili ne forgesis la proprajn lingvon kaj kredojn. La plimulto el ili aspektas kiel ni kaj faras tion, kion ni faras.

Mi tre ŝatas Fatiman, ĉar kiam ŝi havas iom da libertempo, ni bonege amuziĝas. Ŝi klarigas al mi arabajn literojn kaj montras, kiel eblas fari el ili belegajn bildojn. Krom tio, ŝi rakontas sanktajn historiojn de sia popolo. Mi ŝatas aŭskulti pri la profeto Mahometo – kiu havis grandan barbon, belan ĉevalon kaj konversaciis kun anĝeloj. Kaj pri la sankta urbo, kie blanke vestitaj homoj promenas ĉirkaŭ templo. Kaj pri tio, ke tagmeze islamanoj genuiĝas sur tapiŝoj, rigardas direkte al la sankta urbo kaj kune preĝas al Dio. En diversaj religioj ekzistas diversaj nomoj de Dio, sed, laŭ mia Avo, ĉiam temas pri la sama persono kaj pro tio ĉiuj religioj estas egalaj.

Avo opinias, ke Fatima estas tre kuraĝa, ĉar surstrate ŝi ĉiam surhavas sian tukon. En kelkaj landoj estas personoj, kiuj ne ŝatas islamanojn nur pro tio, ke ili alimaniere vestas sin kaj alimaniere preĝas. Krom tio, foje estas malfacile komuniki kun ĉiuj el ili, ĉar, precipe knabinoj, ne ĉiam rajtas lerni – ĉefe ne fremdajn lingvojn. Bedaŭrinde, ĉu ne? Por kelkaj personoj ĉiu islamano estas teroristo – almenaŭ tion oni asertas en kelkaj gazetoj kaj televidprogramoj. Sed mi jam scias, ke tio estas mensogo!

Mi demandis al Avo, kiuj estas teroristoj kaj li precize klarigis al mi. Ili deziras ŝanĝi vivkondiĉojn, posedi sian landon aŭ eĉ la tutan mondon. Ili ne konsentas pri iuj aferoj, kaj foje nepre volas, ke aliaj personoj vivu laŭ ilia maniero kaj kredoj. Teroristoj ne ĉiam volas kaj povas diskuti kun politikistoj aŭ prezenti sin en televido, do ili koleras kaj ofte suferigas aliajn homojn por koncentri aliulan atenton sur la propraj aferoj. Kelkaj havas pafilojn, bombojn kaj mortigas homojn, por ke poste oni skribu pri tio en gazetoj aŭ Interreto kaj parolu en televido.

Antaŭ kelkaj jaroj, kiam mi ankoraŭ ne ekzistis, teroristoj kidnapis aviadilojn, detruis en Usono grandajn domojn kaj mortigis multajn personojn. Ne plaĉis al ili, ke usonaj soldatoj troviĝas en iliaj landoj, do ili decidis venĝi. Post kiam iu en televido diris, ke la teroristoj estis islamanoj, en pluraj landoj homoj komencis timi islamanojn, ĉar ili pensis, ke ĉiuj ili estas teroristoj. Kompreneble, tio estas malvera, ĉar la plejmulto el la islamanoj estas ordinaraj, bonaj homoj.

Kiam la teroristoj detruis la domojn en Usono, Fatima estis tre malgranda. Sed la sekvan tagon, dum ŝi promenis en parko kun sia familio, ebriaj viroj kriaĉis kaj ĵetis ŝtonojn sur ilin. Ili diris, ke Fatima estas malgranda teroristino kaj ke ŝi iru for al sia propra lando. Ili vundintus ŝin, se ŝiaj patro kaj fratoj ne estus ŝin defendintaj kaj ne vokus policon. Ŝiaj familianoj vivas tie ĉi de pluraj jarcentoj, do ili troviĝas en propra lando. Tie ĉi ili elkreskis kaj tie ĉi troviĝas tomboj de iliaj prauloj. Ili neniam faris ion malbonan por ke oni nomu ilin teroristoj!

Avo opinias, ke en ĉiu popolo estas diversaj homoj. Ili havas proprajn opiniojn, religiojn kaj morojn. Ili vestas sin diversmaniere, manĝas malsamajn pladojn, kantas malsimilajn kantojn. Danke al tio la mondo estas varia kaj tre interesa. Pro tio estas tiel agrable vojaĝi kaj konatiĝadi kun ili. Poste oni povas reiri hejmen kaj rakonti siajn travivaĵojn al proksimuloj por montri, kia estas la mondo kaj kiaj homoj vivas malproksime. Avo ŝatas labori kun Fatima kaj rememoradi por ŝi siajn vojaĝojn. Li diras, ke se ŝi deziros, oni povos fari libron el ŝia disertaĵo, traduki ĝin en Esperanton kaj ĝin eldoni. Eble Fatima estos iam fama verkistino!

Eĉ se iu kredas je malsimilaj aferoj kaj preĝas alimaniere, tio ne signifas, ke li estas malbona aŭ ke oni devas eviti lin. Ĉiu religio povas esti kialo por fari bonon. Ĉiuj tamen komprenas la religiojn laŭ propra maniero. Kvankam en televido oni diras malbonajn aferojn pri iu popolo, tio ne signifas, ke ĉiu informo estas vera. Oni ne rajtas nomi iun teroristo aŭ lin ofendi alimaniere nur pro tio, ke liaj samlandanoj aŭ parencoj suferigis iun. Ĉiu homo respondecas nur pri la propraj agoj.



## SEPA RENKONTO

# Sinjoro Pawlak kaj Pepulino



### TEMOJ

Maljunulejo, maljuneco, handikapo, malkutima agado, malriĉeco, soleco, sufero pro rememoraĵoj, psika malsano, paralizo.

Unufoje monate mi akompanas Avon por viziti flegejon. Tio estas speciala loko, en kiu loĝas multaj maljunaj personoj kaj ankaŭ kelkaj junaj. Ili ne havas proprajn hejmojn kaj iliaj familioj ne deziras aŭ ne povas zorgi pri ili. La tieaj loĝantoj ofte estas malfortaj kaj malsanaj, do ili bezonas tuttagan helpon de kuracistoj kaj flegistinoj. La domo iom similas al hospitalo, sed la personoj, kiuj loĝas en ĝi, estas multe pli tristaj, ĉar ili scias, ke ili restos tie ĝis la fino de la vivo.

La flegejo, kiun ni kune vizitadas troviĝas en antikva kastelo. Apude estas bela parko kun grandegaj arboj. Ili nomiĝas platanoj, senĉese perdas ŝelon kaj havas fruktojn en formo de belaj globetoj. Ĉe la alia flanko de la kastelo oni havas ĝardenon plenan je fruktoj kaj legomoj. Dum bela vetero la loĝantoj de la domo promenadas laŭ puraj aleetoj, sidas sur benkoj aŭ en ligna laŭbo kaj ĉiam volonte konversacias kun ni.

En la flegejo loĝas Sinjoro Pawlak, kiun ni tie ĉiam vizitas. Li estas konato de Avo el infanaĝo. Sinjoro Pawlak ne plu havas piedojn kaj pro tio li uzas invalidan rulseĝon (invalido estas handikapita homo). Rulseĝo similas al fotelo kun grandaj radoj. Oni povas puŝi ĝin tenante malantaŭe ĉe la dorsapogilo. Ankaŭ Sinjoro Pawlak mem povas movi la radojn. Li veturas ĉiam tre malrapide, ĉar li timas fali – precipe grimpante sur altajn trotuarojn.

Avo diras, ke Sinjoro Pawlak estas tre soleca. Lia familio loĝas en vilaĝo kaj laboras en granda bieno kun kampoj, arbaro, porkoj, bovinoj kaj kunikloj. Antaŭ multaj jaroj Sinjoro Pawlak havis akcidenton. La rikoltmaŝino, per kiu li falĉis maizon, vundis liajn piedojn. En la hospitalo montriĝis, ke ne plu eblas savi ilin, pro tio nun li ne povas paŝi kaj devas uzi rulseĝon. La familianoj de Sinjoro Pawlak ne sciis bone prizorgi lin, do li ekloĝis en la flegejo kaj neniam plu revenis al la vilaĝo. Li tre sopiras. Kompatinda, ĉu ne?

Kiam ni alvenas, Sinjoro Pawlak fariĝas tre kontenta. Li diras, ke li havas nepinon de mia aĝo, sed li vidis ŝin nur sur foto, do mi estas lia adoptita nepino. Li ĉiam sidigas min sur sian rulseĝon kaj petas, ke mi rakontadu al li pri diversaj aferoj el la lernejo kaj el la mondo. Estas por mi iom strange kaj maloportune sidi tiel sur liaj kriplaj kruroj, sed se pro tio Sinjoro Pawlak estas iomete ĝoja, mi ĉiam sidas kun li dum kelka tempo por konversacii, kaj poste mi kuras por ludi en la parko. Avo restas kun Sinjoro Pawlak. Ili babiladas kaj kartludas.

En la parko mi ofte renkontas Pepulinon. Ŝi estas afabla maljuna sinjorino, kiu tre multe kaj tre rapide parolas, foje ankaŭ kantas. Ŝi faras tion eĉ estante tute sola. Sinjoro Pawlak diras, ke neniu scias, kiu ŝi estas. Antaŭ kelkaj jaroj policistoj trovis ŝin en stacidomo. Ŝi ne kapablis diri, de kie kaj kien ŝi vojaĝas, do oni transportis ŝin al la flegejo kaj ŝi restas tie ĝis nun. La flegistinoj tre ŝatas ŝin, kaj ĉar ŝi parolas multe, kiom birdo en printempo, tial ili nomis ŝin Pepulino, kaj ĉiuj akceptis tion.

Pepulino ĉiam donas al mi bombonon, peceton da ĉokolado aŭ kuketon volvitan en papera buŝtuko. Ili estas la dolĉaĵoj, kiujn la loĝantoj de la flegejo ricevas kiel deserton. Pepulino ofte ne manĝas ilin, sed konservas por mi. Antaŭe mi tre hezitis preni de ŝi tiujn donacojn, ĉar hejme mi ĉiam havas dolĉaĵojn. Krom tio, Pepulino foje portas ilin en poŝo dum kelkaj tagoj, do kiam mi ricevas ilin, ili estas gluecaj kaj malbelaj. Tamen Avo diris al mi, ke por Pepulino la dolĉaĵoj estas tre valoraj, ĉar ŝi havas nenion alian por donaci al mi. Ŝi tiel montras simpation al mi. Do, kvankam mi ankoraŭ iom hezitas, mi akceptas ilin kaj dankas.

En la flegejo loĝas ankaŭ junuloj ligitaj per zonoj al rulseĝoj. Ankaŭ en iliaj litoj estas specialaj zonoj, ĉar la junuloj ne kapablas mem moviĝi. Avo diras, ke tiu malsano nomiĝas paralizo. Por ke ili ne enuu, foje oni legas librojn por ili aŭ ŝaltas televidilon. Tamen mi opinias, ke tio helpas ne multe, ĉar ili bezonas babiladon kaj ridon.

Dum festotagoj ni venas tien kun la lerneja klaso kaj kun nia Instruistino por prezenti spektaklojn. Ni preparas ankaŭ kartojn kun bondeziroj. Ĉiuj loĝantoj de la flegejo tre ĝojas, laŭtege aplaŭdas nin kaj poste ni kune kantadas. En tiuj momentoj multaj personoj kortuŝiĝas kaj ploras, ĉar ili rememoras similajn momentojn en sia hejmo. Mi estas tre trista, ke mi ne povas helpi al ili alimaniere.

Eĉ se iu estas tre malsana, loĝas en speciala domo kaj strange aspektas aŭ agadas, tio ne signifas, ke necesas eviti lin aŭ ŝajnigi, ke li ne ekzistas. Handikapitaj kaj solecaj personoj bezonas ne nur flegadon, sed ankaŭ simple ĉiutagan ĝojon. Estas bone doni ĝin precipe al tiuj, pri kiuj iliaj propraj familioj preferus forgesi. Ĉiu homo bezonas amon kaj ĉeeston de proksimuloj – precipe se li estas malsana kaj soleca.



## OKA RENKONTO

# Sinjoro Karleto



### TEMOJ

Senhejmeco, dependiĝo, alkoholismo, hejma perforto, malkutimaj aspekto kaj agado, ekskludo, negativaj stereotipoj, neantaŭvidebleco de agado, soleco.

Dum la tuta semajno pluvis. Post la lecionoj en la lernejo mi restadis hejme, ĉar Panjo timis, ke mi malsekiĝos kaj malvarmumos. Do, plenuminte hejmtaskojn mi sidis ĉe la fenestro, desegnis, legis kaj rigardis al homoj, kiuj kuris pro la pluvo. Ne ĉiuj tamen saltis super flakoj. Surstrate staris Sinjoro Karleto, kiu timas nek pluvon, nek froston kaj kiun preskaŭ ĉiutage oni povas renkonti en la ĉirkaŭaĵo.

Sinjoro Karleto estas senhejma. Foje li loĝas en rubejo, bushaltejo, telefonbudo, aŭ se iu forgesos ŝlosi pordon li dormas en la koridoro aŭ kelo de nia blokdomo. Oni ne scias, kiom da jaroj li havas. Tamen li ne estas maljuna, kvankam li tiel aspektas. Li havas grandan barbon kaj longajn hirtajn harojn sur la kapo. Li vestas sin per makulita verda mantelo kaj blua lana jako. Li iomete similas fabelan sorĉiston. Somere li plektas florkronon, metas ĝin surkapen kaj ĝojas, se iu ridetas al li.

En la pasinta vintro Avinjo Maria trikis por li gantojn, ŝalon kaj ĉapon. Tre kortuŝita kaj kontenta li diris, ke neniam antaŭe li ricevis tiel belan donacon; ke Avinjo Maria ĉiam povas kalkuli je li; ke li preĝos por ni ĉiuj kaj ke se iu deziros fari al mi ion malbonan, li defendos min. Afable, ĉu ne? Sed li ne akceptis inviton je nia festa matenmanĝo.

Sinjoro Karleto ne laboras kaj havas tre multe da libera tempo. Plej ofte li sidas sur barilo antaŭ butiko kaj parolas al preterpasantoj. Li ne estas malĝentila. Foje li demandas pri vetero, rakontas humuraĵojn aŭ diskutas pri politiko. La vendistino ŝatas lin, ĉar li helpas al ŝi porti en la butikon skatolojn kun vendaĵoj, kaj somere li kunportas akvon el publika pumpilo por akvumi florojn kaj legomojn sur la ekstera vendotablo. Kelkaj personoj aĉetas por Sinjoro Karleto panon aŭ ion trinkeblan. Li ĉiam multe dankas kaj demandas, ĉu li povus tion iel rekompenci.

Dum varmaj tagoj Sinjoro Karleto malbonodoras pro tio – laŭ Panjo –, ke li ne lavas sin, ne purigas vestaĵojn kaj ne vizitas friziston. Vintre policistoj ofte forprenas lin kaj dum kelkaj semajnoj oni ne renkontas lin. Sinjoro Karleto loĝas tiam en domo por senhejmuloj, en kiu li povas senpage dormi, manĝi, lavi sin, ricevi freŝajn vestaĵojn kaj renkonti homojn, kiuj vivas laŭ la sama maniero kiel li. Sed kiam alvenas pli agrabla vetero li revenas sur la straton, ĉar tute ne plaĉas al li, ke en la senhejmulejo oni ne rajtas drinki bieron kaj vodkon.

Panjo diras, ke ĝuste pro la drinkado Sinjoro Karleto ne havas propran hejmon. Iam li loĝis en alia urbo kun edzino kaj infano. Tamen iun tagon li perdis laboron kaj deprimiĝis. Ĉiutage li pli kaj pli drinkis alkoholaĵojn. Ebria li batis siajn familianojn aŭ rompadis vitrojn de montrofenestroj. Finfine policistoj kondukis lin en malliberejon. Kiam li eliris el ĝi, li ne plu revenis al la familio kaj decidis vivi surstrate.

Estas tagoj dum kiuj Sinjoro Karleto estas tre ebria. Tiam li vagadas surstrate, krias kaj kantas kiel homoj en sportejo. Tiuokaze vendistoj ne permesas al li resti antaŭ la vendejoj, najbaroj forigas lin de antaŭ la amasloĝejoj, por ke li ne timigu infanojn. Mi ne scias kien li tiam iras kaj kie li dormas. Multaj personoj timas lin. Najbarino, kiu loĝas en la dua etaĝo kaj havas bebon en puŝĉareto, vidante Sinjoron Karleto ĉiam deturnas la kapon kaj transiras la straton – eĉ kiam li ne estas ebria.

Mi malofte parolas kun Sinjoro Karleto, ĉar ni ne havas komunajn temojn. Foje li demandas pri lernejo, faras por mi fajfilon el herbofolio kaj montras kiel fari por uzi ĝin. Mi parolas kun li nur kiam mi promenas kun Paĉjo. Tiam ni haltas apud Sinjoro Karleto kaj demandas, ĉu li bezonas ion. Sed li tre malofte petas helpon. Nur iam li bezonis grandan kudrilon kaj ŝnuron por ripari siajn ŝuojn.

Avo diras, ke Sinjoro Karleto estas tre interesa homo, sed kiu ne sukcesis mastrumi siajn devojn. Iam li laboris en fabriko kaj konstruis maŝinojn por minejo. Hejme li bredis kolombojn kaj estis fiera pro multaj sukcesoj. Liaj kolomboj estis tiel belaj, ke li gajnis konkursojn eĉ eksterlande. Iun tagon tamen li drinkis vodkon en la laborejo, okazigis akcidenton kaj pro tio oni maldungis lin.

Nun li diras, ke post tio li ekvivis novan vivon kaj li ne scias, ĉu li iam estos sufiĉe kuraĝa por reveni al la edzino kaj la infano. Li ĉiam promesas viziti ilin en venonta monato, sed ĝis nun li neniam efektivigis tion.

Eĉ se iu ne havas hejmon, malbone odoras kaj foje estas ebria, tio ne signifas, ke li estas malbona kaj evitinda. Kelkaj personoj perdis siajn hejmon kaj familiojn, ĉar ili ne sukcesis solvi la proprajn problemojn aŭ ne scias vivi kun aliaj homoj. Pluraj senhejmuloj dezirus komenci vivi alimaniere, sed aliaj simple deziras vivi kiel nun. Ĉiu el ili meritas respekton, parolon kaj helpon. Kun ĉiuj eblas dividi tempon, atenton kaj vortojn.




# NAŬA RENKONTO

## Sinjorinoj Olga kaj Teresa

**TEMOJ**

Diverseco de seksoj kaj vivstiloj, samseksaj paroj, homofobio, negativaj stereotipoj, diskrimino de virinoj, humiligo, subigo, kidnapo, civitaj organizoj, feminismo.



En la mondo ekzistas diversaj familioj. Plej ofte en unu loĝejo kunvivadas patro, patrino kaj infano, aŭ eĉ kelkaj infanoj. Se eblas, ili dividas domojn aŭ apartamentojn kun geavoj, geonkloj kaj iliaj infanoj, eĉ kun fremduloj. En kelkaj landoj kune loĝadas en grandaj domoj eĉ dekkelkaj personoj. Foje iu transloĝiĝas aŭ mortas kaj la familio fariĝas malpli granda. Tamen ekzistas ankaŭ tiaj familioj, kiaj kunvivas en la sama loĝejo, sed ili estas nur du viroj aŭ du virinoj, foje ili eĉ edukas infanon.

Ĝuste tiel estas en la vilaĝo de Avo. En bieneto, apud arbaro, vivas Sinjorino Olga kun Sinjorino Teresa. Sinjorino Olga verkas poemojn kaj kreas belegajn pentraĵojn, kiujn eblas vidi dum ekspozicioj en multaj urboj kaj eĉ aĉeti ilin. Sinjorino Teresa zorgas ilian hejmon, bonege kuiras kaj okupiĝas pri turistoj, kiuj venas al ili por iom ripozi en la bieneto. Oni povas tie rajdi ĉevalojn, fiŝkapti ĉe lageto, promeni tra la arbaro, trankvile distriĝi aŭ fari nenion.

Sinjorinoj Olga kaj Teresa estas tre sendependemaj. Tio signifas, ke ili deziras mem zorgi pri ĉio memstare. Ili diras, ke virino kapablas fari la samon kiel viro, do en ilia bieneto ili fartas bone kune laŭ propraj reguloj. Panjo opinias, ke ili estas tre kuraĝaj. Tamen, se iun tagon en ilia grenejo aperas musoj, Sinjorinoj Olga kaj Teresa tre laŭte krias pro timo kaj venigas Avon por ke li forpelu la bestetojn. Amuze, ĉu ne? Mi ŝatas viziti ilin, ĉar mi rajtas rigardi kiel Sinjorino Olga pentras, kaj krome Sinjorino Teresa permesas al mi rajdi ĉevalon. Ĉe ili ĉiam estas tre agrable.

Avo diris al mi, ke dum siaj vojaĝoj per Esperanto li vizitis hejmojn, en kiuj unu edzo havas kelkajn edzinojn – eĉ kvar. Ili divididas siajn devojn por ĉiutage zorgi pri diferencaj aferoj tiel, ke unu el ili havas liberan tempon. Ilia edzo devas gajni multe da mono por vivteni la edzinojn kaj pagi la loĝkostojn. En aliaj landoj estas inverse. Se mankas virinoj, unu edzino foje havas kelkajn edzojn kaj tiam ŝi decidas pri ĉio.

Avo opinias, ke ĉiu rajtas vivi laŭ propraj preferoj, kondiĉe ke oni ne suferigu aliajn personojn. Ne gravas ĉu estas virino aŭ viro. Bedaŭrinde ne ĉie estas tiel. En kelkaj lokoj oni tre malbone traktas virinojn, eĉ knabinojn. Ili ne rajtas vizitadi lernejon aŭ oni permesas al ili lerni nur iom legi kaj skribi – neniom pli. Ili ne rajtas konduki aŭtojn sen permeso de viroj aŭ eĉ decidi kie ferii. Kelkaj el ili ne rajtas montri surstrate siajn harojn aŭ vizaĝojn, do ili portas specialajn vestojn tra kiuj ili malmulton vidas. Ili rajtas demeti la vestojn nur hejme.

Ekzistas familioj en kiuj nur virino devas okupiĝi pri mastrumado kaj infanoj. Kaj ŝi devas obei. Se ŝi estus malobeema al siaj patro, edzo aŭ fratoj, tiuj rajtus puni kaj eĉ bati ŝin. Mia Panjo ĉiam diras, ke knabinetojn oni ne rajtas bati eĉ per floreto. Tamen ŝajnas, ke ne ĉiuj pensas kaj faras tiel. Tute certe ne faras tiel nia najbaro, kiu ofte batas siajn edzinon kaj infanojn. Ŝi certe dezirus forlasi lin, sed ne havas taŭgan lokon kien fuĝi, do ŝi defendas nur la infanojn kaj krias por voki helpon de policistoj. Tre kompatindaj homoj – ĉiuj.

Kelkaj ĉefoj malrespektas virinojn en laborejoj. Pagas al ili malpli ol al viroj, malgraŭ tio, ke virinoj laboras same. Ekzistas ankaŭ malbonaj homoj, kiuj vendas virinojn kaj infanojn aŭ devigas ilin labori sen salajro. Ili ofte faras tion sekrete kaj la sklavoj ne povas paroli al iu ajn pri sia malfeliĉo. Multaj personoj kaj organizoj penas ŝanĝi tion, sed la afero estas tre komplika, ĉar en kelkaj landoj tiaj situacioj okazas de pluraj jarcentoj.

En nia lernejo knaboj rakontas anekdotojn pri blondulinoj dirante, ke blondulinoj estas stultaj. Bonŝance ni scias, ke tio estas nur ŝerco! Eĉ en nia hejmo Paĉjo foje ripetas tian humuraĵon kaj ni ĉiuj ridas, ĉar Panjo estas ja blondulino. Same oni ridas pri policistoj, instruistoj, politikistoj kaj pastroj. Avo diras, ke se ĉiuj komprenas, ke temas pri ŝerco kaj ili kune ridas, tio damaĝas neniun. Kelkaj seriozegaj personoj tamen tute ne scias ŝerci kaj tuj ofendiĝas. Oni do devas scii al kiu kaj kie rakonti iajn anekdotojn.


Unufoje jare Sinjorinoj Olga kaj Teresa invitas ĉiujn konatojn al festo ĉe fajro. Paĉjo tiam kunportas gitaron kaj oni longe kune kantadas. Panjo helpas al Sinjorino Teresa kuiri, kaj Avo pre-

paras lignajn stangetojn por rosti kolbasetojn super la fajro. Alvenas multaj najbaroj kaj konatoj el la urbo. Estas tre agrable, ĉar ĉiuj amuziĝas, ĉirkaŭe lumas koloraj lampetoj. Krome, mi ne devas en tiuj okazoj frue enlitiĝi! Sinjorino Olga pruntedonas al mi sian dormosakon kaj mi rajtas resti kun ili la tutan nokton.

Eĉ se ies familio ne similas la vian, tio ne signifas, ke ĝi estas malbona kaj ke necesas eviti tiajn homojn. En iuj hejmoj foje decidas virino, foje viro. En aliaj oni diskutas kaj decidas kune. Plej grave estas, ke ili amu unuj la aliajn kaj ke la infanoj, pri kiuj ili zorgas, havu sekuran kaj amikan hejmon. Ĉiu familio estas trezoro, kiun necesas protekti.



# DEKA RENKONTO
## Rikardo



### TEMOJ

Malkutimaj aspekto kaj agado, dikeco, rufa hararo, okulvitroj, diskrimino, ekskludo, malsano, soleco.

La komputilo de Paĉjo difektiĝis. Ho ve! Paĉjo instruas en lernejo matematikon kaj foje preparas per la komputilo taskojn por siaj gelernantoj aŭ plenigas listojn de notoj sur retpaĝo. Kompreneble li bone scias uzi komputilojn kaj – kiel diras Panjo – li ĉiam inventas ion por solvi problemojn. Tamen foje la situacio estas senesperiga, la komputilo estas pli malsana ol kutime, do necesas peti helpon de vera fakulo. Paĉjo ne ŝatas sendi la komputilon al teknika servo, ĉar en ĝi li gardas gravajn labordokumentojn, kiujn li ne rajtas montri al fremdaj personoj. Krom tio, en la servejo oni kutime riparadas komputilojn dum kelkaj tagoj kaj Paĉjo ĉiam hastas. En tiu okazo necesas do voki Rikardon.

Rikardo estas nia najbaro, kiu loĝas en la teretaĝo. Li ĉiam bonege lernis kaj nun estas studento ĉe politeknika altlernejo (por estontaj inĝenieroj), kvankam en sia aĝo normale li devus frekventi ankoraŭ mezlernejon. Li estas tiel gaja! Vizitante nin li ĉiam rakontas anekdotojn, kaj ni ĉiuj ridegas. Krome li scias ripari ĉion – eĉ la komputilon de Paĉjo. Li ĉiam rifuzas monon pro la helpo kaj per manoj li ridetante nur forpuŝas Gepatrojn kvazaŭ obstinajn muŝojn. Tamen Paĉjo bone scias rekompenci lin. Ili tuj sidiĝas ĉe tableto kaj ŝakludas, eĉ ĝis malfrue nokte. Malgraŭ la penado de Paĉjo, Rikardo ĉiam gajnas. Iun tagon li venkis ankaŭ Avon!

Rikardo bone fartas ĉe ni, ĉar ni ne priridas lin. En aliaj lokoj oni ofte mokas lin pro lia aspekto, ĉar Rikardo estas tre dika. Krom tio li uzas okulvitrojn kaj estas rufhara. Ekzistas malmultaj homoj kiel li, do pluraj personoj ŝokiĝas vidante lin. Kelkaj eĉ haltas surstrate kaj montras lin per fingro aŭ fotas per poŝtelefonoj. Rikardo ne povas rapide kuri, do malĝentilaj infanoj ofte suferigas lin, kromnomas lin „dikulo” aŭ „elefanto” provokante, ke li postkuru ilin. Sed li ŝajnigas ne aŭdi kaj nur provas paŝi pli rapide. Poste li estas tre laca kaj ŝvita, kaj devas halti por ripozi.

Panjo diras, ke Rikardo havas malsanon, kiu nomiĝas diabeto. Por bone farti, ĉiutage li mem devas injekti al si medikamentojn aŭ tuj manĝi ion sukeran. En la familio de Rikardo ĉiuj havas tiun malsanon kaj ĉiuj estas tre dikaj. Lian patron oni eĉ operaciis en hospitalo por malpligrandigi lian stomakon. Pro tio nun li manĝas tre malmulte, kvazaŭ birdeto, sed bedaŭrinde lia pezo malpliiĝis nur iom. Panjo diras, ke ili naskiĝis tiaj kaj eble estontece kuracistoj inventos manieron por helpi ilin. Dume, ili ĉiuj devas tre atenti por ne manĝi tro. Krom tio ili ne rajtas manĝi iajn nutraĵojn, ĉar estus danĝere por ilia vivo.

Iun tagon mi ludis en la korto kaj Rikardo sidis sur benko legante libron kaj atendante siajn gepatrojn. Apude laboristoj fosis truon en la grundo. Unu el ili ofte provokis Rikardon dirante: „Se mi havus tian hararon, mi mortigus min pro honto!”. Krome li diris, ke la gepatroj de Rikardo certe estas tre malriĉaj kaj ne havas hejme spegulon, ĉar se ili havus ĝin, li povus vidi, kiel malbela li estas, kaj fuĝus al Antarkto.

La laboristoj ridaĉis tiel laŭte, ke finfine Rikardo ne eltenis kaj fuĝis hejmen. Mi vidis, ke irante li viŝis unue la okulvitrojn kaj sekve la okulojn. Verŝajne li ploris pro honto kaj bedaŭro. Sed li ja ne kulpas pro sia aspekto! Li certe dezirus esti malpli dika kaj povi kuri, salti, bicikli...

En la hejmo de Rikardo ĉiuj mebloj estas fortigitaj por ke ili ne rompiĝu. Ili ne havas seĝojn, sed benkojn el dikaj lignopecoj. Ankaŭ en la banĉambro kaj necesejo oni devis instali oportunajn meblojn por ke Rikardo kun siaj gepatroj povu tie facile moviĝi. Eĉ por ŝnuri ŝuojn ili bezonas taŭgan ilon el drato, ĉar ili ne kapablas klini sin por tuŝi la piedojn. Estas tre malfacile trovi vestaĵojn por tiel dikaj personoj. Ili ĉiam vizitas fakan butikon aŭ mendas vestaĵojn ĉe tajloro, sed tio estas multekosta.

Panjo diras, ke Rikardo estas tre soleca kaj pro tio li multe legas aŭ konversacias kun iu pere de Interreto. Krom tio li interesiĝas pri muziko kaj iam partoprenis en televida konkurso. En la konkurso oni demandis pri titoloj de kanzonoj. Gajnas tiu, kiu plej malmulte eraras. Kaj Rikardo gajnis! Mi estas tre fiera, ke mi havas tiel saĝan najbaron. Oni eĉ montris lin en la televido.

Eĉ se iu ne aspektas same kiel la la plejmulto el ni, tio ne signifas, ke li estas malbona aŭ evitinda. Unu naskiĝas granda, alia malgranda. Iu havas longan nazon, alia dikan ventron aŭ kalvan kapon – kaj ili neniel respondecas pri tio. Precipe se iu malsanas kaj pro tio li malbone aspektas, certe tiu estas eĉ pli malfeliĉa. Oni ne rajtas pli suferigi tiajn personojn. Ofte en ne tre bela korpo estas kaŝita granda inteligento kaj varma koro.



# DEK UNUA RENKONTO

## Daria



### TEMOJ

Malkutimaj aspekto kaj agado, ciganoj, malriĉeco, malsato, ŝtelo, negativaj stereotipoj, antaŭjuĝoj, diskrimino, senhejmaj infanoj.

Hodiaŭ pasas la tago de ordigado. Paĉjo diras, ke tiam la tuta hejmo renversiĝas, do por eviti freneziĝon, li forveturas por viziti Avon. Kutime li revenas vespere kaj preparas por ĉiuj bongustegajn krespojn. Dume, kun Panjo, mi trarigardas ŝrankojn kaj bretarojn ordigante la trovitajn objektojn en du skatolojn. En la unuan ni metas la necesajn, kiuj devas resti, kaj en la duan tiujn, kiujn ni ne plu uzos.

Okazas, ke ni ricevas donace aŭ mem aĉetos ion, kio jam troviĝas hejme, aŭ kio finfine ne estas uzata. Tial foje mi havas duoblajn librojn, ludilojn, por kiuj mi jam estas tro granda aŭ kiuj neniam plaĉis al mi (Avinjo Maria ĉiam aĉetas ĝuste tiajn). Sed la plimulto de la nebezonataj aĵoj estas vestaĵoj, ĉar mi rapide kreskas kaj ne plu povas surmeti ilin. Panjo diras, ke oni rajtas nek forĵeti ilin, nek forporti en kelon, kie ili povus difektiĝi. Ŝi opinias, ke necesas dividi tiajn objektojn kun personoj, kiuj bezonas ilin kaj certe estos kontentaj.

En la korto tre ofte ludas Daria, foje eĉ dum la tuta tago. Ŝi loĝas proksime, en ligna dometo kaj neniam estas sola. En ŝia hejmo ĉiam troviĝas kelkaj personoj. Ŝi havas plurajn gefratojn, gekuzojn, geonklojn... Panjo diras, ke la familio de Daria estas tre integriĝema, ĉar ili estas ciganoj. Ĉio ĉi nomiĝas tradicio.

La familio de Daria estas tre malriĉa. Nur ŝia patro laboras de tempo al tempo, kaj la patrino mastrumas kaj zorgas pri ĉiuj infanoj. En la lernejo Daria apartenas al mia klaso, sed ŝi venas tre malofte – unufoje semajne, eĉ malpli. Ŝi devus esti en pli supera klaso, sed ŝiaj notoj estis malbonaj kaj ŝi devas relerni pli facilan programon. Ankaŭ ŝiaj gefratoj.

Daria diras, ke ŝi ne ŝatas la lernejon. Ŝi ne eltenas sidadi ĉe skribotableto dum tuta leciono, kaj se ŝi vagadas en la klasĉambro, nia Instruistino grumblas. Daria ne ĉiam komprenas, kion oni diras al ŝi, ĉar hejme la familio parolas nur la ciganan lingvon. Do, en la lernejo Daria enuas, malbone lernas kaj ne faras hejmtaskojn. Ŝi ankaŭ ne emas ŝanĝi vestaĵojn por gimnastiki, ĉar ŝi hontas. Ofte ŝi havas malpuran kaj truitan ĉemizon. En ilia hejmo ne estas akvo el krano, foje mankas ankaŭ elektro, do ne eblas lavi kaj purigi ĉion.

La infanoj en la lernejo ne tre ŝatas ŝin. Ili opinias, ke Daria estas stulta, malpura kaj malbonodoras. Kiam iu ĝenas ŝin, ŝi plendas al siaj fratoj, kiuj koleras kaj batas tiujn, kiuj diris pri ŝi malbonajn aferojn. Okazas tiam granda skandalo, kaj ĉiuj devas iri la la direktoro por klarigi la problemojn. Nia Instruistino estas tiam maltrankvila kaj venigas al la lernejo la gepatrojn de Daria. Post tiaj okazaĵoj Daria dum kelkaj tagoj ne venas al la lecionoj.

Daria ne estas invitata de aliaj infanoj al iliaj hejmoj, ĉar ili opinias, ke ŝi ŝtelas. Iun tagon ŝi prenis sandviĉon el mia sako, ĉar ŝi estis malsata. Kiam mi rakontis pri tio al Panjo, ŝi tre maltrankviliĝis, sed ekde tiam ŝi donas al mi unu sandviĉon pli. Tiel mi ĉiam povas dividi manĝaĵon kun Daria, kaj kiam ŝi ne estas en la lernejo, mi povas dividi ĉion kun iu ajn bezonanta. En mia klaso estas kelkaj infanoj, kiuj hejme ne matenmanĝas kaj foje eĉ ne tagmanĝas. Iliaj gepatroj estas senlaboruloj, do ofte mankas al ili mono eĉ por manĝaĵoj.

Avo iam montris al mi libron kun bildoj, kiu rakontas, ke iam ciganoj vagadis tra la mondo en ĉaroj. Ili posedis ĉevalojn, katenitajn ursojn, vendadis al homoj kaldronojn kaj patojn. Ciganinoj profetis estontecon per kartoj kaj vendadis kolorajn vestaĵojn. Nun ili ne plu faras tion. Neniu plu deziras aĉeti iliaj patojn kaj vestaĵojn, ĉar en grandaj magazenoj tiuj estas malpli multekostaj kaj pli variaj laŭ la elekto. En urbocentroj, kie ili nun loĝas, ne eblas bredi ĉevalojn aŭ ursojn. Avo diras, ke la mondo ŝanĝiĝis de post tiu tempo, sed kelkaj personoj ne volas tion rimarki.

Pro tio nun pluraj ciganoj estas tre malriĉaj kaj ne scias zorgi pri diversaj problemoj. Pro tio, ke ili ne venas al lernejoj, multaj el ili scias nek legi, nek skribi. Pro tio neniu deziras akcepti ilin por labori. Se ili ne havus grandan familion, kiu povus helpi ilin, la vivo de multaj el ili estus tre malfacila.

Eĉ se iu estas malriĉa, ne havas modajn vestaĵojn kaj stinkas, malbone lernas kaj pasigas sian tempon surstrate, tio ne signifas, ke li estas malbona, kaj ke oni devas eviti lin. Ĉiu familio havas proprajn problemojn kaj provas solvi ilin laŭ siaj ebloj – foje efike, alifoje malefike. Anstataŭ ne rimarki aŭ forlasi iun vivantan en mizero, preferinde estus ekkoni lian sorton kaj reciproke dividi niajn mondojn. Por ĉiuj tio estos tre grava leciono pri la vivo.




# DEK DUA RENKONTO

## Marko kaj Gabriela

### TEMOJ

Vicfamilio, malsano, malsato, sando, HIV/aidoso, negativaj stereotipoj, antaŭjuĝoj, diskrimino.



Avo havas novajn najbarojn. En dometo ĉe la alia flanko de lia vilaĝo ekloĝis vicfamilio. Tio estas familio, kiu konsistas el panjo, paĉjo kaj infanoj – sed kelkaj el la infanoj havas ankoraŭ aliajn gepatrojn. Foje okazas, ke la unuaj gepatroj ne volas aŭ ne povas zorgi pri la propraj infanoj, tial oni serĉas vicfamilion kiu akceptus ilin kvazaŭ tiuj estus iliaj propraj infanoj.

En la familio de la najbaroj de Avo estas kvar infanoj. Unuj estas Irena kaj Paŭlo, kiuj havas blondajn harojn kaj bluajn okulojn. Ili jam estas grandaj: ili lernas en mezlernejo, kien ili memstare biciklas. La aliaj estas Marko kaj Gabriela, kiuj havas nigrajn hararojn kaj okulojn kaj tre similas unu la alian, ĉar ili estas ĝemeloj. Tio signifas, ke ilia panjo naskis ilin en la sama tago. Ili havas nur kelkajn jarojn, sed kiam ili estos iom pli aĝaj, pro sia simileco, ili povos ŝerci, interŝanĝi vestaĵojn kaj ŝajnigi esti la alia. Bonege, ĉu ne?

Marko kaj Gabriela venis el Rumanio kaj restos en la vicfamilio minimume tri jarojn (eble pli, se necese). Ili ankoraŭ ne parolas nian lingvon, ĉar ili ĵus komencis lerni ĝin. En sia lando ili parolas la moldavan. Iliaj veraj gepatroj havas ankoraŭ kelkajn infanojn kaj estas tre malriĉaj. Ili loĝas solaj kaj la infanoj vivas en speciala infandomo (en ĝi loĝas ankaŭ multaj aliaj infanoj, kiuj pro diversaj kialoj ne povas vivi ĉe sia hejmo) kaj en aliaj vicfamilioj. Ili tre sopiras unuj la aliajn kaj certe estas tristaj.

La novaj najbaroj de Avo estas kuracistoj. Kiam ili havas liberan tempon, ili vestas sin kiel doktoro-klaŭnoj, vizitas hospitalojn kaj flegejojn por amuzi malsanulojn. Antaŭ tri jaroj ili vojaĝis kun grupo de doktoro-klaŭnoj al Rumanio kaj laboris tie en flegejo por infanoj, kiuj havas HIV/aidoson. Tie ili renkontis Markon kaj Gabrielan, ekamis ilin kaj decidis inviti ilin al nia lando, por ke ili loĝu iom da tempo tie ĉi, trankvile lernu kaj estu kuracataj.

Mi estas ankoraŭ tro juna kaj ne scias klarigi kio estas HIV/aidoso, sed Avo diras, ke temas pri tre grava malsano. Se la malsanuloj ne prenas multajn medikamentojn, eĉ malgranda malvarmumo povus esti danĝera por ili. La malsanuloj je HIV/aidoso ofte estas malfortaj, tristaj kaj devas multe ripozadi. Multaj personoj ne komprenas la malsanon kaj provas eviti la malsanulojn por ne infektiĝi! Ili eĉ timas brakumi ilin, mansaluti aŭ kune manĝi. Tamen tiel ne eblas infektiĝi! La najbaroj de Avo jam de pluraj jaroj laboradas kaj vivadas kun malsanuloj je HIV/aidoso kaj ja estas sanaj.

Avo diras, ke en Rumanio vivas miloj da personoj malsanaj je HIV/aidoso. Iam en la lando regis malbonaj homoj, kiuj kaŭzis malsaton al la popolo. Eĉ infanoj en la infandomoj ne havis sufiĉe da manĝaĵoj. Iu do ekhavis la ideon injekti sangon al la infanoj, same kiel oni faras en hospitaloj por fortigi malsanulojn. Do, oni injektis sangon al la malsataj infanoj. Bedaŭrinde oni ne kontrolis sufiĉe la aferon kaj injektis sangon prenitan pli frue el malsanuloj je HIV/aidoso. Pro tio multaj infanoj malsaniĝis. Nuntempe ili jam estas plenkreskaj kaj ofte transdonas la malsanon al propraj infanoj. Estas tre malfacile solvi la problemon.

En la tuta mondo HIV/aidoso timigas. Homoj timas infektitajn personojn kaj eĉ timas viziti samajn kuracistojn, kiujn vizitas la malsanuloj je HIV/aidoso. Oni ofte ne deziras, ke sanaj infanoj lernu en samaj lernejoj kun la malsanaj. Foje eĉ okazas, ke oni forigas familion de malsanuloj je HIV/aidoso el publika loĝejo.

Tial la malsanuloj je HIV/aidoso kaj iliaj familianoj estas tre malfeliĉaj. Ofte ili kaŝas sian problemon por ne perdi laboron aŭ ne esti devigataj fuĝi. Estas malfacile kompreni, ke aliajn malsanulojn oni zorgeme flegas kaj tiujn je HIV/aidoso oni timas, eĉ persekutas, kaj ne deziras renkonti sur sama vojo. Tiaj malsanuloj ofte pensas, ke neniu bezonas ilin, ke ili estas malbonaj kaj danĝeraj. Tio ja estas malvero!

Marko kaj Gabriela ankaŭ malsanas je HIV/aidoso, sed danke al la helpo de la vicfamilio kaj de bonaj medikamentoj ili fartas bone kaj eble iam resaniĝos. Ili aspektas kaj ludas kiel ordinaraj infanoj. Se oni ne konas ilian historion, oni eĉ ne pensus, ke ili estas tiel malsanaj kaj povus baldaŭ morti. Avo diras, ke estus tre bone amikiĝi kun ili, por ke ili estu certaj, ke ili vivas en amo,

sekuro kaj se okazus problemoj, ili havas konatojn, de kiuj ili ricevos atenton kaj subtenon. Por bonvenigi ilin, Avo portis al ili pomkukon. Kiam ili alkutimiĝos al la nova loko, mi akompanos Avon por konatiĝi kun Marko, Gabriela kaj ilia vicfamilio.

Ĉiu povas malsaniĝi iel ajn – eĉ je HIV/aidoso: ankaŭ vi, viaj proksimuloj, viaj familianoj kaj konatoj. Eĉ se iu grave malsaniĝis, tio ne signifas, ke li estas malbona kaj ke necesas eviti lin. Ĉeesto de aliaj personoj, kuna laborado, ludado, iu ajn aktivado helpas al malsanuloj pli rapide resaniĝi, aŭ almenaŭ pli bone farti. Ankaŭ via ĉeesto kaj rideto povas esti por ili medikamento.




# DEK TRIA RENKONTO

## Emilia

**TEMOJ**

Riĉeco, soleco, solaj gepatroj, divorco, manipulado, klaĉado.



Nia lernejo estas malgranda, do preskaŭ ĉiuj konas unuj la aliajn. Ankaŭ niaj gepatroj kaj geinstruistoj, ĉar ni loĝas proksime. Foje tio estas tre utila, kiam necesas pruntepreni kajeron aŭ peti ies helpon en diversaj aferoj. Ni ne devas serĉi konatojn en granda distanco. Ni ofte renkontiĝas kaj ĉiuj pri ĉiuj ĉion scias. Nu, preskaŭ! Sed estas ankaŭ Emilia kaj ŝia patrino. Ili estas iom strangaj kaj iom misteraj.

Emilia loĝas kun la patrino kaj servistino. Ili alvenis nur antaŭ kelkaj monatoj. Ŝia patrino estas aktorino kaj ofte forveturas por labori je teatraĵoj aŭ filmoj. Tiam pri Emilia zorgas la servistino. Ŝi mastrumas, preparas manĝaĵojn por Emilia, helpas ŝin solvi lernejajn hejmtaskojn, eĉ venas al la lernejo por renkonti geinstruistojn, se necese. Tamen ŝajnas, ke ili ne ŝatas unu la alian, ĉar Emilia neniam parolas pri ŝi. Ni eĉ ne scias la nomon de la servistino!

La patrinon de Emilia mi vidas tre malofte. Mi konas ŝin bone el televido, ĉar ŝi rolas en seria filmo por infanoj. Kiam ŝi revenas hejmen, ŝi devas esti tre laca, ĉar ŝi ege malofte iras eksteren. Promenante kun Emilia, ŝi ĉiam surhavas nigrajn okulvitrojn. Strange, ĉu ne? Eble ŝi ne deziras, ke iu rekonu ŝin? Tamen ĉiuj iel ajn scias, ke estas ŝi. Oni nur mallaŭte parolas pri ŝi kaj se ŝi ne vidas, oni indikas ŝin per fingro al aliaj, ĉar ŝi estas vera stelulino.

Emilia ĉiam havas tre belajn vestojn. Ŝi posedas amason da roboj, bluzoj, pantalonoj, kiujn ne eblas aĉeti en niaj butikoj. Panjo diras, ke ili estas tre multekostaj vestaĵoj kaj ne ĉiu povas aĉeti tiajn. Emilia jes povas, ĉar ŝia patro laboras eksterlande, gajnas tre multe da mono kaj sendas al ŝi valoregajn donacojn. Ankaŭ la patrino de Emilia estas bone salajrata, pro tio ili ne devas heziti, kiam ili deziras aĉeti malkutimajn vestaĵojn, kosmetikaĵojn aŭ aliajn aferojn. Kiam en televido aperas reklamo pri iu nova poŝtelefono aŭ ludilo, oni scias, ke Emilia tuj havos ilin kaj invitados koleginojn por vidigi la novaĵojn.

Infanoj el nia klaso ne tre ŝatas ŝin, ĉar Emilia estas tre memfida. Nur kiam ŝi bezonas ion (ekzemple kiam ŝi volas kopii ies hejmtaskon aŭ inviti gastojn por montri novajn donacojn) ŝi fariĝas tre afabla al ĉiuj. Ŝi alportas tiam en la lernejon dolĉaĵojn kaj pagas ĉies ŝuldojn ĉe la lerneja butiketo, kiam oni aĉetas kajeron aŭ trinkaĵon. Al kelkaj knabinoj ŝi diras, ke ili estas la plej bonaj amikinoj, sed ŝi tre rapide forgesas tion kaj neatendite eĉ ĉesas paroli kun ili.

Knabinoj el mia klaso diras, ke Emilia verdire ne plu havas patron, kaj ke la sinjoro, kiu sendas al ŝi donacojn el eksterlando estas nur iu amiko de ŝia patrino. La vera patro ne loĝas kun ili, ĉar li divorcis je la patrino. Kelkaj opinias, ke ili ne plu amas unu la alian. Aliaj diras, ke la patrino de Emilia ĉiam renkontiĝas kun pluraj sinjoroj, pro tio neniu longe restas kun ŝi. Mi ne scias, kiel tio okazas, sed Avo diris, ke plenkreskuloj foje havas seriozajn problemojn, kiujn infanoj ankoraŭ ne kapablas kompreni.

Emilia loĝis jam en pluraj urboj. Ŝia patrino eĉ ĉiujare subskribas kontrakton kun nova teatro kaj ili transloĝiĝas. Ĉio ĉi estas ĝena, ĉar ili eĉ ne sukcesas amikumi kun iu en unu loko, kaj post tre mallonga periodo ili devas forveturi al alia. Mi opinias, ke ĝuste pro tio Emilia ne scias amikiĝi kun koleginoj en la klaso. Ŝi simple neniam lernis esti kun iu dum pli longa periodo.

Kiam la servistino havas libertempon, Emilia povas fari hejme kion ajn ŝi deziras. Ŝi ne devas plenumi ĝustatempe la hejmtaskojn; eĉ nokte ŝi rajtas rigardi filmojn – ankaŭ tiajn por plenkreskuloj; ŝi rajtas aĉeti diversajn aferojn per telefono, ludi en kuirejo kaj per la multaj komputilaj ludoj, kiujn ŝi havas. En la tuta hejmo estas amaso da ludiloj. Emilia ne devas ordigi ilin, ĉar tion faras la servistino.

Mi pensis, ke la vivo de Emilia estas tre plezurplena, sed Panjo klarigis al mi, ke ŝi certe estas tre malfeliĉa. Ŝi ne povas brakumi siajn gepatrojn kiam ŝi deziras. Ili nek promenas kune, nek vizitas kinejon. Ili ne manĝas kune hejme. Familianoj ne vizitas ilin. Kiam Emilia aperas ie kun sia patrino, tiam homoj rigardas ilin kaj flustre prikomentas, kio certe ne estas agrabla. Avo diris, ke Emilia penas por aĉeti amon kaj amikecon, sed tio neniam funkcias.

Pluraj infanoj loĝas nur kun patro aŭ patrino. Kelkaj gepatroj divorcas kaj unu restas sola kun la infanoj. Ne ĉiuj tamen estas riĉaj kiel Emilia kaj ŝia patrino. Aliaj gepatroj tre amas unu la alian, sed ili ne havas laboron, do ili devas forveturi eksterlanden kaj vizitas siajn hejmon kaj infanojn nur kelkfoje en jaro. Multaj tiaj familioj dispeciĝas, kaj la infanoj, kiuj estas pro tio malfeliĉaj, ofte malbone lernas, uzas drogojn aŭ renkontiĝas kun malbonaj homoj. Pri seninfanaj gepatroj, precipe la riĉaj, foje oni rakontas malbelajn kaj malverajn aferojn (tio nomiĝas klaĉo).

Eĉ se iu povas aĉeti ĉion, tio ne signifas, ke li estas feliĉa. Senpartneraj gepatroj, eĉ tiuj tre riĉaj, ofte devas peni ankoraŭ pli, ĉar ili havas pli multajn malfacilaĵojn zorgante pri hejmaj problemoj. Iliaj infanoj ofte havas plurajn objektojn, sed al ili mankas la ĉeesto de la gepatroj, amo kaj hejma etoso. Do, eĉ se tiaj homoj estus malfacile elteneblaj, estus bone apogi ilin per amikeco kaj ilin kuraĝigi alfronti diversajn zorgojn. Oni neniam scias, kio povus okazi.




# DEK KVARA RENKONTO

## Roberto

**TEMOJ**

Malkutimaj aspekto kaj agado, kancero, morto, negativaj stereotipoj.



Iun tagon mi sketis en la korto kaj falis. Kiam mi ekstaris, mi konstatis, ke mia kruro estas vundita kaj ke mi havas kapdoloron. Panjo tre maltrankviliĝis kaj veturigis min al hospitalo. Neniam antaŭe mi estis tie, do mi tre timis.

Unue ni atendis en longa vico ĉe giĉeto, en kiu afabla sinjorino petis, ke Panjo subskribu iujn dokumentojn kaj poste ŝi indikis al kiu kuracisto ni devas iri. Ni supreniris ĝis la unua etaĝo, kie akceptis nin Sinjoro Doktoro. Li estis tre amuza kaj tre multe parolis! Sinjoro Doktoro diris, ke mi certe falis de sur dinosaŭro, aŭ trafis min kosmoŝipo, kaj ke li devas do min komplete volvi per bandaĝo. Eĉ Panjo, kvankam ŝi estis tre maltrankvila, komencis rideti, ĉar ŝi sciis, ke li ŝercis.

Sinjoro Doktoro rapide ŝmiris mian kruron per medikamento kaj ja bandaĝis ĝin. Tio iomete doloris min, sed mi estis tiel ŝokita, ke mi eĉ ne ploris. Poste mi veturis kun li per lifto en malluman ĉambron, kie per radioj iu sinjorino faris foton pri mia kapo. Tio nomiĝas iksradia foto kaj tute ne dolorigas! Dum la sinjorino prilaboradis la foton, ni devis atendi en koridoro.

Tie alparolis min knabo. „Saluton Kama!" – li diris. „Verŝajne vi ne rekonas min." Ho ve, vere! Estis Roberto el mia lernejo. Antaŭe ni ofte kunludadis dum paŭzoj, sed de tempo mi ne plu renkontis lin. Mi devas konfesi, ke tie ĉi li aspektis tre strange kaj se li ne alparolus min, mi preterpasus ne rimarkinte lin aŭ eĉ ne volus paroli kun li.

Roberto estis en piĵamo kaj tute ne havis harojn sur la kapo, nek brovojn, nek okulharojn. Li iris tra la koridoro tre malrapide kaj tenis altan stangon, sur kiu pendis stranga plasta saketo ligita kun tubeto, kiu finiĝis sub lia piĵamo. Sinjorino en kolora vesto gvidis lin por fari iksradian foton. Elirinte el la ĉambro li eksidis apud min por atendi, do ni povis iomete babili. Mi ne sciis pri kio demandi unue, sed ŝajnas, ke Roberto estis jam kutimiĝinta kaj mem rakontis al mi ĉion.

Antaŭ kelkaj monatoj li falis dum leciono de gimnastiko kaj ne povis leviĝi. Alvenis kuracistoj per blanka kamioneto kaj kun laŭta signalo transportis lin al hospitalo. Tie oni ekzamenis lian sangon, faris iksradian foton kaj tre detale ekzamenis ĉion. Kiam lia patrino alvenis por paroli kun la kuracistoj, unue ŝi tre longe restis en ilia ĉambro kaj poste ŝi eliris plorante kaj longe brakumis Roberton. Sinjoro Doktoro diris, ke Roberto havas kanceron kaj se li ne prenos tuj medikamentojn, li povos rapide morti.

Mi ne scias detale klarigi kio estas kancero. Avo diris al mi, ke estas tiel, kvazaŭ interne de Roberto ekloĝus iu nevidebla besteto. Komence ĝi dormas, do estas malfacile konstati, ke ĝi estas tie. Sed post ĝia vekiĝo, ĝi estas tre kolera kaj komencas mordi kaj difekti tion, kion homo havas en la ventro, kapo kaj aliaj korpopartoj. La malsano estas vere tre danĝera. Pro tio la malsanulo, liaj gefamilianoj kaj personoj, kiuj zorgas pri li, tre malfacile travivas ĉion.

Por forigi la malsanon el Roberto, en la hospitalo oni lumigadis sur lin specialan lampon kaj glutigadis al li multajn pilolojn. Kiam tio jam ne efikis, oni metis en lian bruston maldikan tubeton per kiu nun li ricevas la medikamentojn. Ĝuste pro ili Roberto estas tre malforta, ĉio multe doloras lin kaj li perdis ĉiujn harojn.

En la parto de la hospitalo, kie li nun loĝas, estas multaj infanoj same kalvaj kiel li kaj ankaŭ plenkreskuloj. Sed neniu el ili ridas aŭ miras vidante la kalvulojn, ĉar oni scias, ke dum tiu malsano okazas tiel. Sinjoro Doktoro diris, ke kiam Roberto resaniĝos, liaj haroj rekreskos. Tamen oni ne povas certi, ĉu ili estos samaj kiel antaŭe. Foje hararoj rekreskas kun alia koloro aŭ fariĝas hirtaj, kvankam antaŭe estis tute malsamaj.


Malsanon, kiel tiu de Roberto, oni tre longe kuracas, eĉ dum kelkaj jaroj – iom en hospitalo, iom hejme. Pro tio Roberto ne povas nun veni al nia lernejo. Tie en la hospitalo ankaŭ estas lernejo, sed nur unu klasĉambro en kiu lernas gelernantoj en diversaj aĝoj. Estas ankaŭ ludejo en kiu la malsanuloj povas uzi televidilon, komputilon aŭ ludilojn. Sed foje ili estas tiel malfortaj kaj sentas tiel grandan doloron, ke ili tute ne povas veni tien. Ili do kuŝas en litoj kaj eĉ ne emas paroli kun iu ajn.

Eĉ se iu aspektas alimaniere ol ĉiuj, ĉar li estas grave malsana, tio ne signifas, ke li estas malbona kaj ke necesas eviti lin. Ne gravas ĉu li malsanas hejme aŭ en hospitalo: ĉie li bezonas helpon, ne nur de kuracistoj kaj flegistinoj. Al malsanulo oni ĉiam povas rideti kaj rakonti ion interesan – eĉ se li ne havas sufiĉe da forto por ludi. Oni povas peni deturni lian atenton de la malsano, plibonigi liajn vivkondiĉojn kaj kuraĝigi lin almenaŭ per ĉeesto.



# DEK KVINA RENKONTO

## Henriko, Laŭra kaj bandoj



**TEMOJ**

Gejunulaj subkulturoj, malkutimaj aspekto kaj agado, konflikto de generacioj, negativaj stereotipoj, perforto.

Sur nia strato oni povas renkonti diversajn homojn. Mi ŝategas rigardi iliajn vestojn. Avo diras, ke laŭ vesto oni povas foje rekoni la karakteron de iu homo kaj la celojn de lia vivo. Kelkaj malgrandaj infanoj kaj plenkreskuloj foje portas preskaŭ la samajn vestaĵojn – almenaŭ de malproksime tiel aspektas. Plenkreskuloj verŝajne ne havas multajn ideojn, do ili simile vestas sin kaj siajn infanojn. Aŭ eble ili ne havas sufiĉe da mono.

La plej grandaj malsimilaĵoj estas videblaj ĉe geknaboj en mezlernejo. Kelkaj ŝategas vesti sin tute diference de la plimulto kaj grupiĝas por montri sendependecon. Kiam oni rigardas ilin eĉ de granda distanco, oni povas rekoni al kiu grupo ili apartenas kaj pri kio ili okupiĝas. Avo diras, ke tio nomiĝas subkulturo aŭ bando. Gejunuloj ŝanĝas siajn bandojn kelkfoje kaj kutime, kiam ili fariĝas plenkreskuloj, ili ne plu interesiĝas pri ili. Amuze, ĉu ne?

Sur trotuaro antaŭ nia blokdomo ofte staras knaboj en sportaj vestoj. Ili havas razitajn kapojn kaj fumas cigaredojn. Kelkaj el ili surhavas kolorajn aŭ blankajn ĉapetojn. Ili ofte diras malbelajn vortojn kaj aŭskultas strangan muzikon: iu tamburas kaj recitas poemojn (sed la poemoj ne similas al tiuj, kiujn ni aŭdas dum lecionoj en la lernejo, sed estas pli longaj kaj por mi komplikaj). Tiuj knaboj ne havas okupojn post lecionoj kaj iliaj gepatroj ofte ne havas laboron – en la lernejo preskaŭ ĉiuj timas ilin. Tamen la loĝantoj de nia strato konas unuj la aliajn, do se iu el la knaboj estas malĝentila, sufiĉas plendi ĉe ties gepatroj kaj li rapide trankviliĝas – almenaŭ portempe.

La knaboj en sportaj vestoj ne ŝatas tiujn, kiuj surhavas ŝalojn. Paĉjo diras, ke la ŝaluloj estas ŝatantoj de futbalo, ili havas propran klubon kaj akompanas sian teamon dum matĉoj en diversaj urboj. Kiam ili iras surstrate, ĉiuj evitas ilin, ĉar ili laŭte krias kaj kantas, diras malbelajn vortojn kaj se iu ĝenas ilin, ili eĉ kapablas bati lin. Ofte ili estas ebriaj kaj bruligas rubujojn aŭ rompas vitrojn de aŭtoj. Pro tio policistoj ofte notas iliajn nomojn, aŭ eĉ arestas ilin.

En la korto apud nia domo ofte estas videblaj Henriko kaj Laŭra. Ankaŭ ili havas siajn bandojn kaj oni povas renkonti ilin revenantajn grupe el la lernejo aŭ parolantajn en la korto pri siaj aferoj. Avo diras, ke gejunuloj en ilia aĝo ne tre ŝatas plenkreskulojn, ofte paŭtas kaj rapide ŝanĝas humoron. Tio estas afero de maturiĝado. Geknaboj tiuaĝe havas aknojn kaj ofte kverelas kun siaj gepatroj. Henriko ofte kverelas kun la patrino, kaj Laŭra kun la patro. La kvereloj okazas precipe kiam ili tro malfrue revenas hejmen, aŭ kiam la gepatroj ne deziras doni al ili monon por pagi biletojn al kinejo.

Henriko ŝatas laŭte aŭskulti muzikojn de strangaj ensembloj. Longharaj sinjoroj gitarludas kaj havas raŭkajn voĉojn. Henriko diras, ke oni povas ekami tiajn muzikojn nur kiam oni aŭskultas ilin tre laŭte. Kiam mi demandis Avon, kiel oni povas ami muzikon, li nur ridis kaj diris, ke tio estas nur ia dirmaniero. Muzikon, pentraĵojn, filmojn aŭ librojn oni povas ami per la koro, kaj tio signifas kompreni kaj travivadi ilin. Do, Henriko travivas ĝin tre ofte, sed lia patrino grumblas, ke estas tro granda bruo kaj iam ŝi freneziĝos pro li. Kaj ĉiam komenciĝas granda skandalo.

Eĉ se estas varma vetero Henriko surhavas nigran jakon el ledo. Li surhavas ankaŭ nigran ĉemizon kaj longajn, pezajn, ledajn ŝuegojn. Li havas longan hararon kaj sur la brakoj strangajn desegnaĵojn: steletojn, literojn kaj bestojn (eĉ malgrandan verdan drakon!). Avo diras, ke tio nomiĝas tatuaĵo. Oni faras tion per inko kaj pikilo, kaj dume tre doloras. Nu, Henriko diras, ke tio tre plaĉas al junulinoj kaj kiam li estos pli aĝa, li krom tio metos en sian nazon arĝentan ornamaĵon. Tiam li aspektos kiel fama muzikisto el la televido.

Ankaŭ Laŭra ĉiam surhavas nigran veston. Ŝiaj haroj estas longaj kaj farbitaj, vizaĝo pala, brovoj kaj okulharoj ankaŭ forte farbitaj. Sur la vangoj foje ŝi desegnas nigran larmon aŭ malgrandan ruĝan koron. Ankaŭ ŝi surhavas plurajn ornamaĵojn en la oreloj kaj kolpendaĵojn. Ŝi volas simili japanan pupon aŭ heroojn el aziaj fabeloj. Ŝi ne ŝatas la muzikon de Henriko, ĉar ŝi preferas japanajn kanzonojn el Interreto, fantaziajn filmojn kaj bildrakontojn. Foje ŝi invitas konatojn kaj preparas por ili japanecajn manĝaĵojn el rizo, algoj kaj krudaj fiŝoj. Ho ve, terure, mi neniam manĝus ilin! Tamen Avo diras, ke tio nomiĝas suŝio kaj ĝi estas tre bongusta.

Eĉ se iu portas strangan veston kaj renkontiĝas kun nekutimaj personoj, tio ne signifas, ke li estas malbona aŭ ke necesas eviti lin. Ĉiu havas rajton vesti kaj kombi sin laŭ sia plaĉo, aŭskulti preferatan muzikon kaj renkontadi homojn, kiujn li ŝatas. Se ĉiuj vestus sin egale aŭ farus la samon, la vivo estus tre teda. Danke al diferencaj homoj kaj malsimilaj preferoj la mondo estas pli gaja kaj pli kolora.



# DEK SESA RENKONTO
## Familio de Onklino Herta



### TEMOJ

Morto, milito, diversecoj de lingvo kaj religio, rememorado pri prauloj, negativaj stereotipoj kaj antaŭjuĝoj.

Komence de novembro ni ĉiam iras al tombejo por lumigi kandelojn sur tomboj. Tiam pli ofte ol kutime ni rememoras mortintojn. Ni regule vizitas kaj ordigas tombojn de familianoj, sed escepte en novembro ni iras ankaŭ al la tomboj de personoj konataj al mi nur el la rakontoj de Avo kaj Gepatroj; soldatoj mortintaj dum milito, unuaj loĝantoj de nia urbeto... Ni ĉiam vizitas la tombon de Onklino Herta kaj Onklo Romualdo.

Kiam mi estis ankoraŭ tre malgranda (tiel malgranda, ke mi eĉ ne memoras), ofte doloris min la gorĝo. Mi do ne povis regule iri al la infanĝardeno, ĉar preskaŭ ĉiutage mi estis malsaneta. Panjo kaj Paĉjo ne povis zorgi pri mi hejme, ĉar ili devis labori. Ili do petis helpon de najbara familio, ke ĝi prizorgu min dum ilia foresto. La familio konsistis el tre interesaj personoj: Onklino Herta, Onklo Romulado kaj iliaj infanoj – Barbara, Irena, Petro kaj Eduardo.

Onklino Herta naskiĝis en Germanio. Ŝia patro estis ministo kaj kiam en Pollando mankis al li laboro en la karbominejo, li ekloĝis ĝuste tie trans la germana landlimo. Kiel knabineto, Onklino Herta ludis kun aliaj infanoj en la korto kaj lernis tre bone paroli la germanan. Ŝi parolis pli bone la germanan ol la polan, ĉar tiel evidente oni parolis ĝin en la lernejo, butikoj kaj surstrate. Tamen iun tagon komenciĝis milito kaj ili ĉiuj devis reiri al Pollando.

Onklo Romualdo estis Ruso. Kiam komenciĝis la milito, dum kelkaj jaroj li devis militservi. Kiam la milito finiĝis, lia brigado haltis en la urbeto en kiu ni loĝas nun. Post la milita periodo oni povis trovi tie multajn bombojn kaj minojn. Onklo Romulado kaj liaj kunuloj ricevis ordonon purigi la urbeton je tiuj militaĵoj. Bedaŭrinde iun tagon unu mino eksplodis kaj grave lin vundis.

Kuŝante en hospitalo Onklo Romualdo renkontis Onklinon Hertan, kiu flegis lin dum pluraj monatoj, nutris lin, ŝanĝis liajn bandaĝojn kaj promenigis lin. Onklo neniam tute resaniĝis kaj ne plu volis reveni al sia patrujo. Bonŝance li kaj Onklino Herta enamiĝis, decidis geedziĝi kaj kune vivi en nia urbeto por ĉiam.

Ne ĉiuj loĝantoj ŝatis ilin[3]. En la urbeto oni memoris soldatojn de diversaj armeoj, kiuj preterpasante dum militoj ofte bruligis domojn kaj faris multajn malbonajn aferojn. Onklino kaj Onklo ne parolis sufiĉe bone la polan lingvon, pro tio oni ofte traktis ilin kiel fremdulojn. Sed kiam ili kreis familion kaj laboris en la urbeto dum pluraj jaroj, ili amikiĝis kun multaj personoj, helpadis al ili kaj finfine oni komencis konsideri ilin kiel ordinarajn malnovajn geloĝantojn. Unu el iliaj amikoj estis Avo, kiu krom Esperanto scipovas kelkajn aliajn lingvojn, do ili povis facile interkomunikiĝi.

Barbara, Irena, Petro kaj Eduardo naskiĝis kaj kreskadis do en hejmo, kie oni parolis tri lingvojn: la germanan, la rusan kaj la polan. Bonege, ĉu ne? Tamen antaŭ multaj jaroj tio ne estis konsiderata bona afero. Avo rakontis, ke multaj personoj malŝatis tion. Do, nur pro tio, ke foje ili ne sukcesis trovi taŭgan vorton por diri siajn pensojn, kelkaj malbone agis dirante, ke ili estas spionoj aŭ perfiduloj. Nur instruistoj en la lernejo komprenis la malfacilaĵojn de la infanoj kaj provis helpadi al ili.

Avo diras, ke post milito aŭ alia katastrofo, homoj timas pri sia sorto, ĉar ili daŭre memoras terurajn momentojn el la pasinteco. Kelkaj tiam kondutas malamike kaj suferigas eĉ infanojn kulpigante ilin pro eraroj de iliaj gepatroj kaj geavoj. Barbara, Irena, Petro kaj Eduardo havis do multajn problemojn – ne nur pro sia lingvaĵo, sed ankaŭ pro religio.

Onklino Herta estis edukita en katolika religio, kaj Onklo Romualdo en ortodoksa. Tiuj religioj estas tre similaj, sed homoj foje ne rimarkas tion kaj deziras, ke ĉiuj preĝu laŭ la sama maniero kiel ili. En la hejmo de Onklino Herta kaj Onklo Romualdo la infanoj preĝis ĉiam kun siaj gepatroj helpe de diversaj libroj verkitaj per malsamaj alfabetoj kaj kantis kanzonojn en diversaj lingvoj. Eĉ kelkajn festojn ili partoprenis dufoje, ĉar en ĉiu religio estas malsama kalendaro, do oni festas en diversaj tagoj la samajn okazojn.

---

3. Pollando (en kiu loĝas Kamila) troviĝas inter Germanio kaj Rusio. Inter tiuj landoj okazis pluraj militoj. Pro tio precipe maljunaj personoj de la tri nacioj ofte rememoras malfacilajn momentojn de sia historio kaj reciproke ne ĉiam fidas unuj la aliajn.

Kiam Barbara, Irena, Petro kaj Eduardo maturiĝis, ili kreis proprajn familiojn kaj instruis siajn infanojn pri respekto al ĉiu religio, ĉar ili scias, ke ĉiuj el ili estas valoraj. Panjo diras, ke tio estas tre bona, ĉar hodiaŭ pli ofte ol antaŭe, oni povas renkonti homojn, kiuj kredas je malsimilaj aferoj. Ili venas el landoj, en kiuj oni preĝas en aliaj lingvoj kaj alimaniere. Ili festas en diferencaj okazoj kaj estimas malsamajn sanktajn librojn, sed iel ajn same kiel ĉie oni precipe deziras vivi pace kaj ĝoje.

Avo diras, ke ni lumigas kandelojn sur la tombo de Onklino Herta kaj Onklo Romualdo por montri, ke ni amas ilin, memoras pri ili kaj respektas kiel ili edukis siajn infanojn kaj transdonis gravajn familiajn valorojn.


Ankaŭ homoj, kiuj parolas diferencajn lingvojn kaj preĝas diversmaniere, deziras vivi en trankvilo kaj paco. Se oni amas iun, tute ne gravas kiun religion li havas aŭ el kiu parto de la mondo li venas. Gravas nur tio, kia homo li estas kaj kiun estontecon oni deziras kune konstrui por si mem kaj por siaj proksimuloj.



# DEK SEPA RENKONTO
## Kim, Alex kaj Elina

**TEMOJ**

Rifuĝintoj, milito, natura katastrofo, malriĉeco, rasismo, diskrimino, ekskludo, civitaj organizoj, handikapo, morto, sufero pro rememoraĵoj.



Baldaŭ estos someraj ferioj kaj mi atendas ilin senpacience! Mi ne devos tiam frue ellitiĝi por iri al la lernejo kaj povos ludi kaj legi librojn la tutan tagon. Pasintjare dum du semajnoj mi partoprenis en feria kolonio. Tio estas renkontiĝo de infanoj, kiuj restadas sen gepatroj en lignaj dometoj aŭ klasĉambroj en lernejo. Zorgas pri ili geinstruistoj kaj gestudentoj. Ĝi estis tre amuza kaj agrabla aranĝo, ĉar ni havis multajn ekskursojn, ludojn kaj konkursojn. Mi konatiĝis kun pluraj infanoj de mia aĝo.

Kompreneble mi ne plu memoras detale ĉiujn partoprenintojn, sed mi plej ŝatis ludi kun infanoj de aliaj landoj. Avo diras, ke estas bone koni tiajn personojn, ĉar oni povas multon lerni de ili. Poste oni povas interŝanĝi bildkartojn aŭ telefoni por demandi, kio okazas malproksime. Miaj geamikoj de tiu kolonio estas Kim, Alex kaj Elina.

Kim estas vjetnamo. Li estas malpli alta ol aliaj infanoj en lia aĝo, ĉar homoj en lia regiono kutime havas malpli grandajn korpojn ol ĉe ni. Li havas nigrajn, tre fortajn harojn, oblikvajn okulojn kaj haŭton iom malpli helan ol la mia. Li venis en nian landon en la ventro de sia patrino kaj naskiĝis tie ĉi. Danke al tio oni permesis al li resti kaj lia patrino rajtis venigi sian familion. Kim tre bone komunikas en nia lingvo kaj evidente ankaŭ en la vjetnama. Li lernas en mia lernejo kaj ĉiuj tre ŝatas lin, ĉar li estas ege afabla.

La gepatroj de Kim gvidas malgrandan restoracion. Ili kuiras en ĝi bongustajn pladojn, kiujn ili spicas laŭ kutimoj de sia lando. Avo rakontis al mi, ke en Vjetnamio homoj manĝas rizon anstataŭ manĝi panon. Eĉ se ekstere estas tre varme, ili ŝatas manĝi varmajn supojn. Anstataŭ forkoj kaj kuleroj ili preferas uzi bastonetojn. Interese, ĉu ne? Kim instruis al mi manĝi per bastonetoj, sed mi ne sukcesis kaj nur makulis ĉion ĉirkaŭe – ankaŭ min mem. Ni ĉiuj ridegis pro tio, sed Kim asertis, ke se mi ekzercos min pri tio, mi certe iam sukcesos.

Alex kaj Elina loĝas en rifuĝejo. Tio estas speciala domo, en kiu rajtas restadi homoj el diversaj landoj. Ili devis fuĝi aŭ perdis sian tutan havaĵon pro milito aŭ iu granda katastrofo (inundo, incendio, eksplodo de atomcentralo ekzemple). La plimulto ne povis kunporti ion ajn, do ili estas tre malriĉaj. Kelkaj el ili jam loĝis antaŭe en rifuĝkampoj en aliaj landoj. Ili parolas diversajn lingvojn, serĉas laboron kaj tre sopiras pri siaj proksimuloj. Estus bone venigi ilin tien ĉi, por ke ili restu konstante, sed oni ne scias, ĉu estos eble. Ne estas do certe, ĉu ili estos ĉi tie post unu jaro aŭ eĉ post kelkaj tagoj.

Pri rifuĝintoj el la tuta mondo zorgas bonaj homoj, kiuj laboras en fakaj organizoj. Ili helpas surloke en diversaj landoj, konstruas tendajn urbetojn, disdividas manĝaĵojn, medikamentojn kaj vestaĵojn. Se iu estas tre malsana, aŭ malbonaj homoj deziras suferigi lin, foje necesas transporti tian personon al alia lando. Tiam laboristoj kaj volontuloj de la organizoj provas prepari dokumentojn por tiaj personoj kaj akiri biletojn por vojaĝo. Kompreneble la helpo ne ĉiam eblas.

Kelkaj rifuĝintoj petas de malbonaj homoj, ke ili helpu al ili fuĝi sen dokumentoj el la danĝera lando. Ili pagas pro tio multe da mono, kaŝas sin en kamiono aŭ sur ŝipo kaj nokte provas kaŝe trapasi landlimon por iri al pli riĉa lando, kie ili estus sekuraj. Tiam ofte kaptas ilin policistoj, kiuj multajn resendas hejmen. Nur kelkaj sukcesas eskapi kaj trovi pli taŭgan lokon por vivi. Tamen ili ofte ne havas dokumentojn kaj tre timas, ke iun tagon oni malkovros kaj malliberigos ilin, aŭ resendos ilin al la lando el kiu ili fuĝis.

Ekzistas homoj, kiuj malŝatas ne nur rifuĝintojn, sed ĝenerale fremdulojn. Ĝenas ilin ies koloro de haŭto aŭ formo de okuloj. Ili kromnomas fremdulojn kiel nigrulojn, flavulojn, blankulojn (depende de loĝloko) kaj opinias, ke ili estas malpli bonaj, malpli inteligentaj kaj malpli valoraj homoj. Tio nomiĝas rasismo.

Alex kaj lia familio naskiĝis en Afriko. Ili havas nigran haŭton kaj amuzajn harojn. Mi ankaŭ dezirus havi tiajn! Alex estas blinda. Li malsaniĝis pro malsato, kiam li estis tre malgranda kaj neniu sukcesis kuraci lin. Iu organizo venigis lin kun la gepatroj al Eŭropo, sed eĉ tie ĉi oni ne sukcesis kuraci lin, ĉar la malsano estis jam tro disvolviĝinta. Dume, en ilia lando, okazis milito, do ili ne plu povis reiri hejmen. Ili restos en nia lando almenaŭ ĝis ilia patrujo estos sekura.

Elina venis el Ĉeĉenio (tio estas lando en Azio) kaj ŝi ne havas gepatrojn. Ŝia patro estis mortigita dum milito kaj ŝia patrino pereis post kiam bombo detruis ilian domon. Elina vidis sian patrinon sub la ruinoj de la domo, sed oni ne plu povis helpi al ŝi. Pro tio Elina nun estas iom stranga. Kiam en la kolonio ni havis desegnokonkurson, preskaŭ ĉiuj infanoj desegnis kolorajn florojn, maron kaj ludilojn – nur la desegnaĵoj de Elina estis ĉiam nigraj. Sur ili estis brulintaj domoj, aviadiloj ĵetantaj bombojn kaj mortigitaj homoj. Nokte, Elina ofte krias dormante kaj poste ĝis mateno ploradas.

Eĉ se iu havas malsaman koloron de haŭto, venas de malproksime aŭ loĝas en malkutima loko, tio ne signifas, ke li estas malbona aŭ evitinda. Ne en ĉiu lando estas sekure, sufiĉas laboro kaj manĝaĵoj. Multaj personoj serĉadas do helpon kaj pli bonajn vivkondiĉojn tie, kie iu alia povus zorgi pri ili kaj dividi sian havaĵon almenaŭ por kelka tempo. Tiaj problemoj povas okazi al ĉiu el ni, do helpo al rifuĝintoj estas natura homa devo.



# POSTPAROLO
## De la verkinto por vi



Karaj Legantoj!

Jen Kamila rakontis al vi pri siaj renkontoj kun Diferenculoj – tio estas personoj, kiuj iel distingiĝas en la ĉirkaŭaĵo. Certe en viaj loĝlokoj kaj familioj, inter viaj konatoj kaj geamikoj ankaŭ vi renkontas Diferenculojn. Eble vi mem opinias vin tre malsama. Des pli bone!

Danke al Diferenculoj la mondo estas interesa kaj ĉiu tago donas novan eblon renkonti unikajn homojn, ekkoni iliajn vivon kaj problemojn. Certe multaj tiaj homoj promenas sur la stratoj kaj vi vidas ilin ĉiutage. Aliajn vi konas el libroj, televido kaj Interreto, el rakontoj de plenkreskuloj kaj samaĝuloj...

Mi deziras al vi, ke ĉiu tia renkonto estu por vi ŝanco lerni ion novan pri homoj, iliaj kutimoj kaj problemoj. Ju pli bone vi ekkonas ilin, des pli facile vi povos kompreni unuj la aliajn malgraŭ diferencoj. De konatiĝo kaj kompreniĝo estas nur malgranda paŝo al amikeco kaj komuna malkovrado de nia granda, mirinda mondo.

Mi deziras, ke vi havu kiel eble plej multe da tiaj renkontoj kaj malkovroj!

***Przemysław Paweł Grzybowski***





## PRI LA VERKINTO

**Przemysław Paweł Grzybowski**

Doktoro pri pedagogio, instruisto ĉe la Universitato Kazimierz Wielki en Bydgoszcz (Pollando). Li interesiĝas pri interkultura kaj kompara pedagogioj.

Kunordigas diskutliston „Międzyszkolnik" de Forumo de Junaj Pedagogoj ĉe Komitato de Pedagogiaj Sciencoj de la Pola Akademio de Sciencoj; prizorgas la Akademian Centron de Volontuloj ĉe la Universitato Kazimierz Wielki. Li estas volontulo en la internacia movado de doktoroj-klaŭnoj de Patch Adams; instruisto de Esperanto, preleganto, ĵurnalisto kaj tradukisto; partoprenanto de pluraj internaciaj iniciatoj pri edukado – i.a. en Brazilo, Ĉinio, Francio, Peruo, Rumanio kaj Vjetnamio.


**KONTAKTO**

diferenculoj@gmail.com


## ELEKTITAJ PUBLIKAĴOJ

**Ili estas akireblaj i.a. en Amazon**
vidu: amazon.com/author/przemyslawgrzybowski

***Ankaŭ Vi estas Fremdulo.*** *Malgranda traktato pri interkultura edukado kaj pri Esperanto kiel ilo de ĝi*. Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, Bydgoszcz 2011 – disponebla en Esperanto.

***Doktoro klaŭno! Terapio per rido, volontula movado kaj interkultura edukado.*** (originala titolo: *Doktor klaun! Terapia śmiechem, wolontariat, edukacja międzykulturowa*) Oficyna Wydawnicza Impuls, Kraków 2012.

***Eŭropa edukado – de multkultureco al interkultureco.*** (originala titolo: *Edukacja europejska – od wielokulturowości ku międzykulturowości*) Oficyna Wydawnicza Impuls, Kraków 2007, 2008, 2009.

***Interkultura edukado – gvidlibro. Nocioj, literaturo, adresoj.*** (originala titolo: *Edukacja międzykulturowa – przewodnik. Pojęcia, literatura, adresy*) Oficyna Wydawnicza Impuls, Kraków 2008, 2009.

***Interkultura edukado – kuntekstoj. De idento al internacia lingvo.*** (originala titolo: *Edukacja międzykulturowa – konteksty. Od tożsamości po język międzynarodowy*) Oficyna Wydawnicza Impuls, Kraków 2011.

***La arto verki kaj prezenti lernejajn kontroltaskojn.*** (originala titolo – verkita kun Krzysztof Sawicki: *Pisanie prac i sztuka ich prezentacji*) Oficyna Wydawnicza Impuls, Kraków 2010.

***Rido en edukado. De lerneja ridkomunumo al interkultura edukado.*** (originala titolo: *Śmiech w edukacji. Od szkolnej wspólnoty śmiechu po edukację międzykulturową*) Oficyna Wydawnicza Impuls, Kraków 2014.

***Sole kun Dio*** (traduko de la libro de Janusz Korczak en Esperanton, preparo de antaŭparolo kaj referencoj en dulingva versio): *Sole kun Dio / A sós com Deus*. Editora Comenius, Bragança Paulista 2007 – disponebla en Esperanto.


# Pri la ilustrintino



**Lucyna Fic -** Amatora, handikapita pentristino loĝanta en Barcin (Pollando). Ŝi ŝategas korespondadon en ĉiu ebla formo, arton, bonan literaturon kaj ankoraŭ pli bonan amikecon. Ŝi kreis ciklojn de pentraĵoj „Kvar jarsezonoj", plurajn portretojn kaj muldaĵojn. Ŝi pentras per farboj oleaj, akrilaj, sekaj pasteloj kaj desegnas per krajono. Ŝia preferata tekniko estas akvarelo.

En Interreto viziteblas ŝia **blogo**:
http://witaj-w-atelier.blogspot.com

# Pri la libro




**Kovrilo de la pollingva libro**

*Renkontoj kun Diferenculoj* estas kolekto de rakontoj pri diversaj personoj, kiuj pro variaj kialoj estas en sia medio diferencaj de la plimulto de la homoj kaj pro tio oni perceptadas ilin kiel strangajn, malkompreneblajn, eĉ danĝerajn. Pri tiaj personoj kutime oni klaĉadas kaj kreas stereotipajn opiniojn – plej ofte maljustajn kaj suferigajn.
La rakontojn prezentas Kamila – kelkjara knabineto. Helpate de siaj gefamilianoj, ŝi konatiĝas kun handikapuloj, malsanuloj, maljunuloj, personoj apartenantaj al fremdaj nacioj kaj kulturoj, praktikantaj diversajn religiojn ktp. La personojn karakterizas diferencaj stiloj de vivo kaj diversaj perspektivoj. Ilia nuntempa situacio estas kutime la sekvo de okazintaĵoj, kiuj influis iliajn karakteron, ideojn pri la mondo kaj motivojn de agado. Kamila konscias, ke ne ĉiuj homoj estas samaj, sed ĉiuj estas egale gravaj, do ili same bezonas estimon, amikecon kaj amon.
La edukaj valoroj de *Renkontoj kun Diferenculoj* estas: toleremo, estimo por individuaj diferencoj, konvinko pri devo konatiĝi kun aliaj homoj antaŭ ol krei propran opinion pri ili kaj deziri pritaksi ilian agadon.
La libreto estas destinita al infanoj en la aĝo de 6 ĝis 10 jaroj. Ĝi povus servi kiel legaĵo en familia rondo, aŭ kiel didaktika materialo en baza lernejo kaj kursoj de interkultura edukado. En Pollando, *Renkontoj kun Diferenculoj* akiris pozitivajn opiniojn de universitataj fakuloj pri psikologio kaj pedagogio. Ĝiaj tradukoj estas disponeblaj en la angla, franca kaj germana lingvoj (sed sen aludoj pri Esperanto). Se iu deziros traduki ĝin al propra lingvo aŭ aperigi ĝin en sia lando (en bita aŭ presita versio, kun propraj ilustraĵoj aŭ preparitaj de lokaj lernejanoj ktp.) bonvolu interkonsenti kun la verkinto pri transdono de la eldonrajtoj.

En la konata retejo por instruantoj kaj lernantoj de Esperanto eblas partopreni retkurson de la libro **RENKONTOJ KUN DIFERENCULOJ**. Tie vi trovos ne nur la tutan libron, sed ankaŭ povos testi viajn sciojn. Krome vi trovos kelkajn specimene laŭtlegitajn ĉapitrojn. Ĉion ĉi vi trovos en la sekcio LIBERAJ STUDOJ. Bonan studadon!

# LIBERAJ STUDOJ www.edukado.net

En tiu ĉi sekcio ni disponigas altnivelajn materialojn ĉu pri Esperanto kaj esperantologia temo, ĉu en Esperanto pri ajna kultura, scienca temo. Nia kriterio estas prezenti interesajn, valorajn materialojn en bona lingvouzo por ke niaj membroj havu eblon pluperfektiĝi pri temoj, rilataj al Esperanto aŭ pere de la lingvo povu akiri novajn informojn. Momente ni havas 9 kategoriojn kaj estas plenigantaj ilin je materialoj.